

Redaktejo  
**LA PRAKTIKO**  
Wilhelm Schmid  
4537 Ooza Kurohama  
Hasuda-mati,  
Saitama-ken, Japanujo  
Administrejo:  
Centra Officejo de U.E.A.  
Nieuwe Binnenweg 176  
Rotterdam-2, Nederlando  
Poŝteekonto: 378964  
Banko: Mees & Hope  
Rotterdam

31-a jaro

Marto 1967

N-ro 3 (353)

## FONDIGIS INFANA SUBORGANIZO DE HUNGARA ESPERANTO-JUNULARO



(Foto: L. Szakácsi)

Societa ludo dum la kunveno de la infana rondo.  
La membronombro de la infana grupo estas jam pli ol cent.

# La Praktiko

**LA GAZETO KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS**

Aperas monate  
Abonprezo: laŭvola, sed minimume 40 Steloj  
por 1967. — Al la Aktivaj Membroj de Universala  
Ligo kontraŭ la jarkotizo. — La abono estas notata nur por plena  
kalendara jaro. — Reklam-tarifo: 1 paĝo 600 Steloj, 1/2 paĝo 360,  
1/4 paĝo 200, 1/8 paĝo 100, 1/16 paĝo 50, 1/32 paĝo 25 Steloj.

# LA PRAKTIKO

monata revuo distra kaj instrua

**Fondintoj:** Andreo Cseh kaj Julia Isbrucker

**Eldonas:**

Universala Esperanto-Asocio (En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.), Rotterdam, Nederlando.

**Redaktas:**

Wilhelm Schmid

**Ĉion por la redakcio**

(manuskriptojn, informojn, solvojn de konkursoj ktp.) oni sendu rekte al la redaktoro:  
Wilhelm Schmid, 4537 Ooaza Kurohama, Hasudamati, Saitama-ken, Japanujo.

**Ĉion por la administrado**

(abonkotizojn, reklamojn, adresŝanĝojn ktp.) oni sendu al la centra administrado ĉe:  
Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 23 27 88. Pĉk en Nederlando: 378964; pĉk en Svedujo: 74374; pĉk en Svislando: 12-2310. Banko: Mees & Hope, Rotterdam; aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de U.E.A.

**Jara abono 1967:**

Laŭvola, sed minimume  
40 steloj; 10 ned. gld.  
Akceptataj estas ĉiuj ĝenerale validaj pagiloj.

**Aktivaj membroj de U.L.**

ricevas la revuon La Praktiko kontraŭ la membrokotizo, (kiu estas egala al la abonprezo), kondiĉe ke la pago estu ricevita ĉe unu el la instancoj de U.E.A. Aldonaj pagoj por brikoj, senditaj al U.E.A., estas tuj transskribitaj al la kredito de U.L.

**Universala Ligo**

havas je dispono, laŭ kontrakto farita je 7.4. 1964, po unu paĝo en ĉiu numero por propraj informoj.

**La aperdato**

de La Praktiko estas la 15-a de ĉiu monato.

**Manuskriptoj por difinita numero**

devas atingi la redaktoron plej laste la 15-an de la antaŭa monato. Ili estu tajpitaj en 2 ekzempleroj, sur unu flanko de la papero, kun interlinia spaco kaj larĝa marĝeno.

## 52-a Universala Kongreso de Esperanto

Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967



**Alta Protektanto:**

Zalman Šazar, Statprezidanto de Israelo

**Konstanta Adreso:**

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando

### Oficiala komunikado

**Dua Bulteno.** — Ĝi aperis antaŭ pluraj semajnoj. Ĉiuj bonvolu nepre sendi siajn plenigitajn mendilojn por loĝado, ekskursoj, karavanvojaĝo ktp. kiel eble plej baldaŭ, por eviti seniluziigojn.

**Klimato.** — Ŝajnas, ke multaj homoj timas troan varmon dum la kongresa periodo. Ni atentigas, ke Tel Aviv ĉiam havas iom da agrabla vento de la maro kaj ke ĉiuj konstruaĵoj, hoteloj kaj aliaj ejoj estas klimatizitaj, ankaŭ la aŭtobusoj. La kongresanoj de Tokio scias, ke en tiaj cirkonstancoj eĉ multe pli granda varmo praktike ne ĝenas!

**Foto-Konkurso.** — Notu bone! Ni atentigas ke, kontraŭe al la informo en la Dua Bulteno, la formato de la fotoj devas esti ne maks., sed minimume 13 × 18 cm.



**Prezo de enskribo:** Unufoja enskribo kosta 3 stelojn, dufoja enskribo 5 stelojn, trifoja enskribo 7 stelojn.

**Favoro:** Ĉiu abonanto de La Praktiko havas la rajton enpresigi sian korespondan anoncon en page unufoje en la jaro.

**GRAVA ADMONO!** Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto.

#### SLOSILO DE MALLONGIGOJ :

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	PM = poŝtmarko
s-ino = sinjorino	PK = poŝtkarto	PI = poŝtkarto ilustrita
f-ino = fraŭlino	L = letero	k.ĉ.l. = kun ĉiu lando
dez. = deziras	kor. = korespondi	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

#### AŬSTRALIO

**Claremont, W.A.** — S-ro W. L. Illingworth, 25 Barnfield-rd, deziras interŝanĝi P.M. Kontraŭ 250 de via lando sendos egalkvanton de Aŭstralio, Nov-Zelando, Malako k.t.p. (represo pro eraro en okt. no. '66.)

#### DANLANDO

**Arden.** — S-ino Uttrup, „Lindely”, Arden, dez. kor. ĉ.t., k.ĉ.l.

#### FRANCUJO

**Talence.** — S-ro Louis Guédon, 1 rue Ambroise-Paré, 33 Talence, dez. kor. kun japana esperantistino.

#### NEDERLANDO

**Leiden.** — F. G. de Ceuninck van Capelle, studanto, Tesselschadestraat 13 A, Leiden, dez. interŝ. gram. diskojn kun popola muziko de ĉ.l. kontraŭ diskoj aŭ aliaj aĵoj.

#### RUMANUJO

**Bukaresto.** — Dez. kor. tutmonde pri arto, geografio, etnografio, muziko, literaturo, scienco, kaj interŝ. PI, muzikdiskojn, pupojn ktp. inĝ. Lucian Cerchez, P.O. Box 338, Bukaresto.

**Násaŭd.** — 27-jara pedagogo en liceo dez. kor.; kolektas gaz., PI, PM, esperantaĵojn. Constantin Paliciuc, str. Mihai Eminescu 10, Násaŭd, Reg. Cluj.

#### USONO

**Iowa City** (Iowa 52240). — S-ro L. A. Ware, 1265 Melrose Ave, serĉas korespondantojn por si mem kaj kursanoj, p.ĉ.t., k.ĉ.l. Respondos almenaŭ unufoje.

# VOJAĜO AL ĈINUJO

(Ĉiuj fotoj de Jomi-uri-gazeto)

Lastjare, mi revis iri al la Universala Kongreso de Tokio per la transsiberia vagonaro, kaj reveni perŝipe, sude. Mi sendube ne frapis al la bona pordo, ĉar mi ne sukcesis iri vagonare. Kvankam mia ir-reir-vojaĝo per ŝipo kaj mia dumonata restado en Japanujo entuziasmigis min, mia koro ĉiam sopiris al vojaĝo per la transsiberia vagonaro. Do, kiam poste mi vidis programon de tute pervagonara vojaĝo al Ĉinujo, mi ekflamiĝis kaj tuj enskribiĝis. Mi ne bedaŭris tion, male.

Oni povas iri de Moskvo al Pekino trans Manĉurio aŭ trans Mongolujo. Mi iris trans Manĉurio kaj revenis sur la alia vojo. Dum la irvojaĝo, ni haltis unu tagon en Irkutsk kaj ekskursis al la lago Bajkal; mi rekomendas al vi nepre fari tiun viziton, kiam vi uzos la transsiberian vagonaron, ĉar vere la promenado estas bela kaj valora, ĉefe se vi iras aŭtobuse al la lago por reiri al Irkutsk per hidroplano.

Por iri de Moskvo al Pekino necesas ses plenaj tagoj. Sed la vojaĝo ne ŝajnas longa ĉar ĝi estas tre agrabla kaj ĉefe interesa. La komforto de la vagonaro estas sufiĉa, eĉ por la dua klaso (la malmola klaso), la restoracio bona. Estas nur kvar personoj en ĉiu kupeo, estas sufiĉe da loko por meti la valizojn, do la vagonoj ne estas plenaj kaj embarasaj kaj oni povas facile moviĝi laŭlonge de la koridoroj. Kompreneble, mi povus skribi multajn, multajn detalojn pri la vivo en la transsiberia vagonaro, de la forneto, kiu varmigas konstante akvon por la teo ĝis la strangaj horoj de la manĝoj ĉe la oriento de Siberio (4a h, 10a h, 15a h) ĉar oni ĉiam havas la horon de Moskvo dum la vojaĝo tra Siberio kaj oni vivas laŭ la suno. Mi pli ŝatas iom detale skribi pri la vojaĝo. Preskaŭ ĉiam ni staris en la koridoro por rigardi la kamparon, la arbaron.

De Moskvo ĝis Ĉinujo, la vojo trairas la faman ebenan arbaron de Siberio, arbaron faritan ĉefe de betuloj, kies blankaj trunkoj speciale altiras la atenton kaj la admiron de la Okcidentuloj. Kelkaj pinoj rompas la unutonecon de la betuloj. Sufiĉe ofte, la arbaro lasas lokon al kampoj, al domoj kaj vilaĝoj sen sonorilturoj. Kaj estas interese vidi la rusajn domojn el ligno konstruitajn kun bariloj el ligno, kun putoj el ligno, kun grandaj amasoj da ligno en la korto por la hejtado dum la vintro. Tre poeziaj estas la nestuoj en formo de lignaj dometoj ĉe la pinto de tre altaj stangoj apud ĉiu kampara domo. Kaj denove arboj kaj arboj pasas, floroj beligas la subarban herbon, de tempo al tempo terure kota vojeto laŭlongiras la fervojon, aŭ la atento de ĉiuj estas altirata de flosantaj trunketoj sur larĝaj riveroj. En la regiono de la lago Bajkal, la pejzaĝo fariĝas monta, kaj la vagonaro transiras multajn el la 336 montaraj alfluoj de la famkonata lago. Antaŭ ol alveni al Pekino, ni jam ekkonas la vivon de la ĉinaj kamparanoj, kiujn ni vidas labori are kun la larĝa pinta pajla ĉapelo, la piedoj en la akvo de la rizejo, aŭ portantaj pezan ŝarĝon per bastono el bambuo, ĉiam kuretantaj por ke la balancado de la marŝo faciligu la portadon. Ni rimarkas la domojn tute el argilo (eĉ la tegmento), la kampojn zorgeme kulturitajn. La alveno en Pekino estas solena: bela moderna stacidomo, multaj oficistoj rigide starantaj laŭlonge de la kajo. Dum majesta muziko sonas, la transsiberia vagonaro malrapide alvenas, kaj fine haltas.

Dum la reirvojaĝo, la iro tra Mongolujo allogas la atenton. Kompreneble, oni ne povas diri, ke la ebena dezerto Gobio estas bela. Tamen tia pejzaĝo altiras kaj ekscitas la imagojn: kameloj, blankaj ostaroj de mortintaj bestoj, sablo kun tufoj de avaraj kreskaĵoj, kaj tuj revenas al la memoro



En ĉina restoraci-vagono

Ĉina laborista domo en Ŝanhajo



Ĉe kuirforno





*Sanhaja laborista familio manĝanta*

ĉiuj rakontoj pri dezerto. La homamaso en la stacidomo de Ulan Bator, la ĉefurbo, estas vere pentrinda kun la homoj tre tipe mongolaj: grandaj, fortaj kun malhelkuprokolora haŭto, vestitaj en naciaj kostumoj.

Kaj nun pri Ĉinujo. En tiu lando, la vojaĝoj estas ĉiam organizataj de la nacia turisma oficejo Luxingshe, kiu disdonas la hotelojn, la gvidistojn kaj la tradukantojn, kaj indikas la programon. Mi nur diros ke la komforto en la hoteloj estas bonega, la ĉina kuirmaniero mirinda (mi vere kredas, ke ĝi estas la unua en la mondo), la personoj, kiuj zorgas pri la turistoj vere afablaj kaj helpemaj, kaj tio sen espero de trinkmono, kiu ne ekzistas en Ĉinujo. Unuvorte, ĉio estas bonege organizita por la plezuro de la vojaĝantoj.

Mi tuj devas diri, ke mi restadis nur tri semajnojn en tiu grandega lando, ke mi ne scipovas la ĉinan lingvon, ke nur la tradukistino de la grupo estis mia ligilo inter mi kaj la Ĉinoj kaj la ĉinaĵoj, ke mi vizitis nur 5 urbojn de la orienta marbordo kaj ke, en tiaj kondiĉoj, mi ne povas esperi koni Ĉinujon. Mi nur havas malgrandan ideon pri tiu grandega lando de 700 milionoj da loĝantoj, la kvarono de la homaro, kaj tiu nombro komprenigas la gravecon de la ĉinaj problemoj.

Kiam oni alvenas en Pekino kaj en granda ĉina urbo, oni estas surprizata de la spektaklo de la strato: grandega svarmanta amaso da piedirantoj, multaj, multaj bicikloj kies kondukantoj ofte transportas pezajn ŝarĝojn, ŝarĝaŭtomobiloj (kiuj kelkfoje estas plenaj je starantaj viroj kaj virinoj), viroj kaj virinoj, jungitaj kiel ĉevaloj, kiuj tiras pezajn veturilojn. La homoj estas simple, eĉ malriĉe vestitaj, sed pure. Pekino havas larĝajn avenuojn borderitajn de modernaj altaj domoj. La popolaj kvartaloj konsistas el simplaj teretaĝaj dometoj kun intermuraj kortoj ombrigitaj de unu aŭ du arboj.

Mi ne pli parolos pri turismo. Tamen, mi ne povas ne diri unu vereton pri la Granda Muro, kiu estas vere mirinda. Nur je 60 km de Pekino, oni povas vidi ĝin suprengrimanta altajn sovaĝajn montojn, kaj tiu vidaĵo certe estas la plej forta memorajo el mia tuta vojaĝo.

Vizito al kvin fabrikoj, de tri Popolaj Komunumoj, de du domaroj por laboristoj, de la Palaco por Pioniroj en Sanhajo iom informis nin pri la vivo de la Ĉinoj. La fabrikoj aspektas por ni ankoraŭ iom malnovaj, sed kelkaj jam havas modernajn maŝinojn. Cetere, la vizito al la Ekspozicio de la Industrioj de Sanhajo sciigis al ni, ke Ĉinujo havas bonajn mekanikajn produktaĵojn. La loĝejoj por la laboristoj surprizas Francojn: unu ĉambro po tri personoj, kuirejo, necesejoj komunaj po tri familioj, kaj tio en novkonstruita domaro.

La loĝejoj estas puraj, tre simplaj, nenia superfluaĵo krom la portreto de la Prezidanto Mao, kiun cetero oni ĉie vidas: en la fabrikoj, en la aŭtobusoj, en la taksioj, la hoteloj, la magazenoj, ktp... ktp... La Popolaj Komunumoj estas gravaj organizaĵoj. Ili povas kunigi ĝis 75.000 personoj, en 95 vilaĝoj. En tiaj grupoj, jam parto de la laboro de la kampoj estas farata de kulturmaŝinoj, kiuj ne estas abundaj en Ĉinujo; ni konstatis tion de la vagonaro. Dum tiuj vizitoj, ni vidis ĉie socialajn realigojn, kiujn profitas la laboristoj: manĝejoj, dormejoj, bibliotekoj, kluboj, kinoj en la fabrikoj, kaj plie, en la aliaj organizaĵoj: bebgardejoj, infangardejoj, hospitaloj, magazenoj. La salajroj estas tre malaltaj, meze 75 juanoj = 30 dolaroj pomonate, kaj nenia monhelpo por la infanoj. Eĉ se oni konsideras, ke la prezoj estas malaltaj, restas, ke la Ĉinoj vivas malriĉe, sed, kaj tio estas tre grava, ili manĝas sate, kaj bonfartas. Kaj nur tio estas granda progreso, kiun komunismo alportas al Ĉinio. Oni ne devas forgesi, ke antaŭ nur dudek jaroj, miloj kaj miloj da personoj mortis pro malsato ĉiujare, ĉefe kiam la rizrikolto estis malbona, ke la ĉinoj estis la sklavoj de kelkaj naciaj aŭ alilandaj, ĉefe eŭropaj potenculoj. Nun, la Ĉinoj estas popolo forta, laborema, honesta, inda. Vidante ĝin, oni estas certa, ke ĝi ekonomie daŭre progresos kaj estos baldaŭ je la nivelo de la okcidentaj landoj. Konsiderante tion, oni komprenas la fervoran admiron de la Ĉinoj por komunismo en la persono de la Prezidanto Mao, de kiu ili pensas ĉion ricevi. Kaj tiu sintenado de la Ĉinoj por Mao estas karakteriza aspekto de la lando. Ĉie portretoj de Mao. Ĉiam oni aŭdas: „... kaj tio pruvas la valoron de la penso de la Prezidanto Mao“, aŭ: „Kaj dank' al la Prezidanto Mao...“. Kompreneble por ni, Francoj, tiel sendependaj, tiu sintenado estas stranga kaj preskaŭ nekomprenbla. Oni havas la impreson ne spiri libere; kaj tio estas malhela punkto. Alia malhela punkto: la edukado de la infanoj. Ni vizitis plurajn lernejojn, infanĝardenojn, unu Palacon de Pioniroj. Ni vidis belajn, gajajn, afablajn infanojn, kiuj bone kantis, dancis, desegnis. Bedaŭrinde, en ĉiuj salonoj de la infanejoj, ni vidis militantajn soldatojn desegnitajn sur la muroj, infanojn kun pafilo sur la ŝultro. Kiam ni diris nian malgajan maltrankvilecon tiu punkte al niaj gvidistoj, ili respondis: „La Ĉinoj amas kaj deziras Pacon. Ili sin preparas por la sindefendado“. Kaj la granda Kultura Popola Revolucio, kiu komenciĝis dum nia restado! Oni malkovris kernon de rezistado al komunismo, kaj tuj reagis per tiu Revolucio. „Oni devas ĝisradike tute detru la burĝecon, kiu ankoraŭ vivas kaŝe en Ĉinio“. Kaj por realigi tion, la kondutlinio estas: „Detru la pasintecon, la feŭdismon“. Kaj ni vidis detruojn artaĵojn en la Palaco de la Imperiestroj kaj alie, ĉar ili estis feŭdaj, oni ŝanĝis la poeziajn ĉinajn nomojn: — strato de la Eterna Paco, Templo de la Ĉielo, ktp... — per revoluciaj nomoj: — Vojo al Komunismo, Parko de la Popolo; Placo de la Ruĝa Oriento, ktp... ktp... — oni frapis kaj enkarcerigis la „burĝojn“ ktp... ktp... La komunistaj studentoj, la „Ruĝaj Gardistoj“ estis la plej ardaĵ kaj agemaĵ, kaj kompreneble pro sia granda juneco faris multajn stultaĵojn. La Mao-eco grandiĝis. La portretoj de la Prezidanto ampleksiĝis. Ĉie sur la stratoj, en la trolebusoj gejunuloj legis laŭte la pensojn de Mao kaj la informojn de la aktuala Revolucio. Ofte ni estis tre maltrankvilaj, tre malhelaj (ne por ni, ĉar la Ĉinoj ĉiam estis tre afablaj por ni) sed pro tiuj okazantaĵoj, kiuj, laŭ ni, ne povis konduki la landon al la feliĉo. Sed, kiu popolo ne havis siajn revoluciojn kun troaĵoj?

Eble vi demandas: „Kaj la esperantistoj en Ĉinujo?“ Mi skribis al „El Popola Ĉinio“ du monatojn antaŭ mia foriro, sed ne ricevis respondon. Kiam mi petis de la agentejo, kiu organizis mian vojaĝon, la adreson de la hoteloj por havi vizitojn ĝi respondis: „Laŭ nia dekjara sperto de vojaĝoj al Ĉinujo, ni povas diri, ke la privataj kontaktoj estas tre, tre malfacilaj en Ĉinujo“. Mi tre bedaŭras tion kaj ne tre bone komprenas.

## 12-an internacian junular-kunvenon

de la 27a de marto (posttagmeze) ĝis la  
2a de aprilo 1967 (posttagmeze) en la  
granda kaj agrabla junulargastejo de

### aachen

(do tuj ĉe la limo inter Belgio, Nederlando kaj FR Germanio).  
La kadra temo estos:

#### „PROBLEMOJ DE DEMOKRATIO”

En mallongaj referaĵoj kaj pluraj diskut-rondoj ni traktos specialajn aspektojn, ekzemple jenajn:

1. „Evoluo de demokratiaj elementoj dum pasintaj jarcentoj”
2. „Jean Jacques Rousseau — heroldo de demokratio”
3. „Monarkio — respubliko — demokratio”
4. „Parlamentoj en diversaj ideologiaj sistemoj”
5. „Nederlanda parlamentismo kaj nova ekstremista partio”
6. „Ĉu en demokratio tolereblas kontraŭdemokratia partio?”
7. „Rajtoj de politikaj malplimultoj”
8. „Balotoj — ĉu mezurilo de demokratio?”
9. „Ĉu partioj ricevu subvenciojn el impostoj?”
10. „Eklezioj kaj demokratio”
11. „Demokratio en Afriko”

Ĉar la 12a IJK estu ne nur stud-, sed ankaŭ ferio-semajno, vi havos sufiĉe da libera tempo por ekskursetoj kaj amuzado. Cetere... dum du aŭ eĉ tri vesperoj vi bezonos reveni en la junulargastejon nur je la 23a horo aŭ eĉ pli malfrue!

Por la tuta 6-taga programo, 6 tranoktoj kaj 3 ĉiutagaj manĝaĵoj junul(in)o malpli ol 25-jara pagos nur GM 60,—; pliaĝulo pagos GM 75,—. Partoprenantoj malpli ol 25-jaraj ĝuos denove *konsiderindan subvencio*: Ili povos elekti ĉu ricevi (1) 50%-an repagon de la vojaĝelspezoj en FR Germanio kaj ĉiutagan subvenciojn de GM 1,50 aŭ (2) ĉiutagan subvenciojn de GM 3,50. La dua ebleco tre taŭgas por partoprenantoj kiuj alvenos el *okcidento*, t.e. tra Belgio aŭ Nederlando, kaj tial ne havos altajn vojaĝelspezojn en FR Germanio. Jen du spezo-ekzemploj:

kotizo	60,—	60,—	
vojaĝelspezoj en FR Germanio	40,—	—,—	
	100,—	60,—	
ĉiutaga subvencio		ĉiut. subv.	
6 × 1,50 GM	9,—	6 × 3,50 GM	21,—
vojaĝsubvencio	20,—	29,—	
sumo de faktaj kostoj	71,—	21,—	

(plus vojaĝkostoj ekster  
FR Germanio)

Cetere, se vi povos partopreni ne la tutan IJK-on, tamen ne rezignu pri almenaŭ parta ĉeesto. Kaze de malpli ol 6-taga partopreno ĉiu plena tago kostos nur GM 11,— (resp. GM 14,— por pliaĝuloj).

Vi povas aliĝi al la 12a IJK sendante plenigitan aliĝilon (aŭ similan slipon kun la respektivaj indikoj) al nia adreso kaj ĝirante antaŭpagon (= parton de la kotizo!) de GM 15,— al la poŝtĉekkonto 545 77, poŝtĉekoficejo Karlsruhe, por: Deutsche Esperanto-Jugend, 44 Münster, aŭ sendante la antaŭpagon poŝtmandate al la adreso, al kiu vi sendas la aliĝilon. Aliĝilo sen antaŭpago ne validas! Antaŭpago neniel estas repagebla en kazo de nepartopreno.

Se vi intencas partopreni la 12an IJK, konvenas jam nun kolekti kelkajn politik-rilatajn artikolojn, libretojn, ekz. la konstitucion de via lando, parti-programojn ktp.!

Post via aliĝo vi ricevos pliajn informojn pri la 12a IJK.

Uwe Joachim Moritz,  
Prezidanto de Germana Esperanto-Junularo

(daŭrigo de p. 212)

Estus domaĝe fini per tiuj malbonaj faktoj, kaj estus nevere, ĉar mia ĝenerala impresio estas pli bona ol malbona. Mi nur povas esperi, tutkore esperi, ke la aktuala Granda Kultura Popola Revolucio trovos klarvidecon kaj saĝecon kaj donos al siaj 700 milionoj da Ĉinoj feliĉon, kiun pro sia kuraĝo kaj siaj pasintaj mizero kaj malfeliĉeco ili juste meritas.

## Penĉo Slavejkov (1866-1912): Poeto de la Bulgara Liberigo

Por bulgaroj la nomo de Penĉo Slavejkov estas por ĉiam ligita kun unu el la plej dramaj periodoj de la historio de ilia lando: la liberigo de Bulgarujo en 1878 post kvin jarcentoj da otomana regado.

Penĉo Slavejkov naskiĝis en la urbo Triavna je la 27-a de aprilo 1866, filo de poeto, kiu mem, kun grupo da aliaj intelektuloj, havis gvidan rolon en la bulgara renesanco de la 19-a jarcento. En 1876, tiam dek-jara, Penĉo vidis mem la popolan ribelon en Stara Zagora, kiu ekbruligis tutlandan ribeladon. La tieaj scenoj de malpaco kaj batalado lasis profundan impreson en la knaba menso kaj fariĝis poste temo de liaj plej gloraj versoj. Lia plej konata verko estas „Sanga kanto”, kies temo estas ĝuste tiu ribelo de 1876. Kvankam li prilaboris ĝin dum 20 jaroj, ankoraŭ ĝi estis nefinita, kiam li mortis.

„Sanga kanto” aperis en fragmenta traduko en Esperanto de Ilia Silverstrieŭ, en 1927. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

### La arbaro kiel polvo-filtrilo

Du milionoj tunoj da polvo — tio estas analoga al la pezo de 20.000 rapidvagonaraj lokomotivoj — falas teren en la germana federacia respubliko; ĝi enpenetras nian bronkojn kaj tie ofte kaŭzas kronikan tuson.

Nur depost mallonga tempo oni batalas metode kontraŭ la polvon. Certe oni ne sukcesos, *tute* senpolvigi industrion kaj trafikon. Sed la arbaro estas bona natura filtrilo. Maljuna fago, havanta pli ol 100.000 foliojn, povas lig-fiksi je sia pli ol 1000 kv.m. folia supraĵo rimarkindajn aer-malpuraĵojn, kiujn poste la pluvo forlavas sur la arbaran grundon.

Tio ne estas teorio. Mezurado montris: Ĉiu litro da aero enhavis ĉe la urba limo de Freiburg (Germanujo) po 66.000 polverojn; ĉe la rando de arbaro estis ankoraŭ 47.000, sed en la arbara interno nur 18.000. En arbaraj regionoj malproksime de urboj estas nur 50, do malpli ol 1/1000 de tio, kion oni trovas en la urba aero. Krome la polva speco de arbaro estas sendanĝera.

Esperantigis Marie Laade

### Gravaj fosili-eltrovoj en Ĉado

Fosilia skeleto de „stegodono”, primitiva speco de elefanto, kiu laŭsupoze atingis Afrikon el Azio dum la kvaternara periodo, malkovriĝis en Ĉado, ĉ. 500 mejlojn (800 km) de Fort Lamy. Laŭ la formo de kranio oni povas konjekti, ke la besto havis kvar denteĝojn, el kiuj la malsupran paron ĝi povis uzi por elradiki arbojn. Aliloke, la sama grupo de sciencistoj, kies laboron pagas la ĉada registaro, elteris restaĵojn de 25 aliaj specioj apartenantaj al la sama periodo.

Ĉiujn ĉi fosiliojn fine elmontras la natur-historia muzeo konstruota apud Fort Lamy. La Nacia Instituto de Ĉado havas jam fosili-sekcion, kaj faka biblioteko estas kolektata. Pro la multeco de la fosili-restaĵoj sur ĉada teritorio facile povas esti, ke Fort Lamy konatiĝos kiel internacia centro de paleontologiaj esploroj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

### Tanzaniaj monumentoj riparataj por turismo

Komenciĝis laboroj por ripari ruiniĝintajn fragmentojn de la kulturaj restaĵoj kaj arkitekturaj, kiujn mahometanoj el Omano kaj la Persa Golfo postlasis laŭ la marbordo de Tanzanio.

Interesaj monumentoj troviĝas plurloke, interalie apud la fiŝista vilaĝo Kuduĉi, 16 mejlojn (26 km) norde de Dar-es-Salamo. Tie la tanzania Konservisto de Antikvaĵoj, s-ro Hamo Sassoon, laboris dum tuta jaro, kaj la loko rapide diskonigiĝis kaj allogis turistojn.

La ruinoj de Kuduĉi konsistas el tomboj de la 18-a jarcento kaj moskeo el korala ŝtono konstruita en la 15-a jarcento kaj poste beligita per ornamaj gipsaj modlaĵoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).


### Norvegujo kunbatalas kontraŭ Afrika analfabeteco

En Norvegujo estos eldonita per financa helpo de la Fondaĵo Dag Hammarskjöld elementa bildolibro en la suahila lingvo por plenaĝas analfabetoj.

La lernolibro, kiu titoliĝos „La Dag-libro”, havos tekston parte ankaŭ en la angla. Ĝi konsistos el du partoj, kun kolorilustraĵoj de afrika artisto. La unua parto estos elementa vortaro, en kiu ĉiu paĝo montras ses ĉiutagajn objektojn kun, apude, la respondaj suahilaj vortoj; la dua enhavos tutpaĝajn desegnaĵojn pri facile rekoneblaj situacioj el la afrika vivo, sub kiuj aperos simplaj frazoj aŭ vorto-grupoj.

Provizore oni distribuos limigitan eldonon de 5.000 ekzempleroj en Tanzanio. Laŭ la plano aperos poste eldonoj en aliaj afrikaj lingvoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

# Malamikoj de la skribmaŝino



La domo de Mainiĉi-gazeto ... por abunde variaj skribsignoj

## Malmoderne

La teknika progreso donas al la mondo certagrade unuformecon. Precipe la novaj urbopartoj en samaj klimataj kondiĉoj similas unu la alian ĉirkaŭ la tuta terглоbo. Tiel ankaŭ la oficejoj; kubecaj mebloj, komfortaj seĝoj, telefonoj kaj — skribmaŝinoj. Sen skribmaŝino ni jam ne povas imagi modernan kontoron kaj eĉ en primitiva malbela budo de karbovendisto aŭ sablotransporta entrepreneto ne mankas tajpilo. Ankaŭ por privatulo iu malgranda skribmaŝino ne plu estas luksaĵo. Ĉu urba administrejo povus funkcii sen skribmaŝinoj?

Japanujo estas industrie bone evoluinta lando. Kiam iun tagon mi devis iri al la urbodomo pro legitimilo, mi do ne malmulte miris: En granda oficejo mizeraspekta laboris pluraj dekoj da geoficistoj, dense lokitaj, sen skribmaŝinoj. Kompense, du fraŭlinoj estis konstante okupataj per kopiaparato, ĉar pri ĉio skribita devis esti farata kopio. Se ili havus skribmaŝinojn — mi pensis — sufiĉus duono de la oficistaro kaj la salajrojn oni povus duobligi, aŭ la impostojn duonigi. „Ĉu en Japanujo oni ne produktas skribmaŝinojn?“ mi demandis mian edzinon. „Kompreneble oni produktas, ankaŭ elektrajn“ — ŝi respondis — „sed ĝenerale ni uzas nur latinliterajn por korespondado en fremdaj lingvoj. Skribmaŝinojn kun japanaj signoj oni malmulte uzas.“

Efektive: eĉ letero el la Centra Poŝtoŝeficejo de Tokio estis skribita mane. Sole kelkaj telegraf-oficejoj uzas teletajpilojn kun katakanasignoj.

## Komplika skribsistemo

Kial do la skribmaŝinoj estas tiel malpopularaj en Japanujo? Kio malhelpas ilian enkondukiĝon? Certe la kaŭzo ne estas konservativeco, ĉar ĉiujn ceterajn modernajn laborilojn kaj instrumentojn la japanoj utiligas senhezite, laŭ la ebloj kiujn donas la ofte nur malaltaj salajroj. Industria kaj komercaj firmaoj stas finance bone, kaj se skribmaŝinoj povus pligrandigi la efikecon de la kontoristaro, ili ne domaĝus la elspezojn. La grava malhelpo estas io alia, nome la komplika skribsistemo.

Japanaj infanoj lernas jam en la unua lerneja jaro unu kompletan silabo-signaron „hiragana“. Tiu konsistas el 46 signoj. Helpe de supersignoj oni ricevas ĉirkaŭ 70 silabojn, kiuj sufiĉas por skribi ĉiun japanan vorton fonetike. En la dua klaso, la infanoj lernas la same multajn silabo-signojn „katakana“. La formoj de tiuj signoj estas eĉ pli simplaj. Oni uzas ilin por skribi fremdajn vortojn (t.e. ne-japanajn kaj ne-ĉinajn) kaj kelkfoje ankaŭ por japanaj vortoj en reklamoj, varomarkoj kaj prononcoklarigoj.

En la kvara klaso la infanoj konatiĝas ankaŭ kun la latina alfabeto, kiun ili poste bezonas por eklerni la anglan lingvon. Tial oni ankaŭ adoptis la anglan sistemon por nomi la literojn de la alfabeto. Solvo ne tre feliĉa! Supozu, ke japano kies nomo estas Umeda, telefone deziras literumi sian nomon. Laŭ japanaj silabosignoj li dirus „u-me-da“ kaj vi tuj komprenas. Laŭ latinliteroj li dirus „ju-em-i-di-ej“ kaj vi bezonas unue 5 minutojn (se vi estas neanglo) por aranĝi la literojn en via cerbo. — Por la japana lingvo la latina alfabeto estas uzata nur en vortaroj kaj lernolibroj pri fremdaj lingvoj, en vojindikoj kaj reklamoj por eksterlandanoj.

フシギ

苦難増大も覚悟

苦難増大も覚悟

苦難増大も覚悟

ku

nan


ZOO

taj

mo

kaku

go



Supre maldekstre: fu-ŝi-gi (miraklo) en simplaj katakana-signoj

Maldekstre (vertikale): manskribita teksto

Meze: la sama teksto maŝinskribita

Dekstre: aperas tiel en la ĵurnalo

Prononco: Kunan zootaj mo kakugo

Signifo: Eĉ se pliiĝos la sufero, ni estas pretaj

Sube: Skribmaŝino kun 1113 signoj; prezo = 2200 steloj

Per la lerno de tri fonetikaj signaroj (hiragana, katakana kaj latinalfabeto) la japanoj ne estas kontentaj. En ĉiuj klasoj oni krome lernas legi kaj skribi ĉiujare pli ol centon da ideografiaĵoj. Fininte la 6-an klason, la infano scias 881 simbolojn apud la jam menciitaj fonetikaj signoj. En la postaj jaroj, depende de la lernejo, oni instruas ankoraŭ milon da aliaj simboloj por legado. Ĉar ĉiu simbolo estas uzata por plejofte du prononce tute malsamaj vortoj, la legado postulas multan ekzercadon.

En 1946 la eduka ministerio eldonis liston de elektitaj 1850 ideografiaĵoj plej necesaj kaj rekomendis al la eldonistaro limigi sin al tio. Kvankam oni ne povas devigi verkistojn (pensu nur pri la uzo de novaj radikoj en Esperanto!), oni feliĉe atingis certan stabiliĝon. Poŝvortaretoj tamen helpas al la nesciantoj per eksplikado de pli ol 4000 ideografiaĵoj, kiuj sufiĉas por legi postmilitajn eldonaĵojn. Studanto de malnova literaturo bezonas vortaron pli ampleksan.

### Vizito ĉe Mainiĉi-ŝinbun

Pensante al tiuj malfacilaĵoj, mi estis tre scivola pri la fabrikado de japanaj gazetoj. Estas ja unu el la plej mirigaj fenomenoj, ke la multeco de signoj absolute ne kaŭzas mallegemon ĉe la japanoj. Laŭ „Der Fischer Weltalmanach” en 1961 trafis al 1000 loĝantoj en Japanujo 416 gazetoj. Kompare: Usono 326, Sovetunio 181, Britujo 506, Italujo 101, Hispanujo 70, Hindujo 11. Ankaŭ en la libroproduktado Japanujo ne postrestas. Kiel la japanaj kompostistoj venkas la malfacilaĵojn?



Kompostopreparmaŝino

Volonte mi do kaptis la ŝanĉon viziti la centron de grava japana ĵurnalo „Mainiĉi-ŝinbun” en Tokio. Kiel atendeble, la sidejo estas impona konstruaĵo, proksime al la imperiestra parko. Grandaj estas ankaŭ la oficejoj kaj laborejoj ĉiufakaj. En la redakcejo — pluraj vicoj da skribotabloj, sed sen skribmaŝinoj! Ĉiu skribas sian artikolon sur speciale kvadratitan paperon. En ĉiu kvadrato devas sidi unu signo; nur tiel la kompostejo akceptas la manuskripton. Tre interesa estas la kompostejo. Kelkdekoj da kompostopreparmaŝinoj en la grandeco de skribotabloj plenigas la ĉambregon. Aranĝitaj en formo preskaŭ kvadrata troviĝas 24 oble 25 klavoj, do entute 600. Sur ĉiu klavo estas skribitaj 4 signoj. La elekto inter tiuj 4 signoj okazas per pedaloj. Novulo certe bezonas 5 minutojn por trovi iun celitan signon. Kiom da signoj kapablas komposti lertulo? „Meze 3000 en unu horo, do preskaŭ ĉiusekunde unu signon”, klarigas kompostisto. Ĝuste dirite, tiuj maŝinoj ne kompostas rekte la tekston, sed nur truetigas paperrubandon (kun 3 kopioj) por posta utiligo en tekstofandmaŝinoj. Tiuj funkcias preskaŭ aŭtomate en alia ĉambrego. Tia maŝino fandas, laŭ la enmetita rubandinstrukcio, ĉiuminute 400 signojn, do proksimume 7 signojn sekunde. Sed kio okazas, se verkisto uzas signon ne troviĝantan inter la 2400 signoj de la kompostopreparmaŝino? Tiucele en apuda kompostejo oni permane aldonas aŭ korektas; krome oni kompostas tie la pli grand-



Redaktejo sen skribmaŝinoj

formatajn surskribojn, reklamojn ktp. Tamen, 95% de gazetotekstoj oni faras maŝine kaj nur 5% mane.

La cetero, vico da gigantaj presmaŝinoj en Svislando fabrikitaj, kiuj ĉe unu flanko ricevas la paperrulegon kaj ĉe alia flanko eljetas la prete falditajn gazetojn, ampleksa ekspeĉejo ktp. ne multe diferencas de aliaj metropolaj gazetoproduktejoj en la mondo.

Ĉu mi ankoraŭ deziras ion vidi, demandas la gvidistino. Jes — mi respondas — ordinaran skribmaŝinon! Kaj mi estas bonŝanca. En unu oficejgungulo de tiu mamuta konstruaĵo troviĝis unu skribmaŝino. Ĝi havas nur malmultajn klavojn por manipuli; la multnombraj skribsignoj metalaj estas rektangle aranĝitaj. Por skribi, oni movas la serĉklavon super la ĉirkaŭ 200 signoj (patricoj), kaj per premo de alia klavo la elektita signo saltas al la farbbendo kiel ĉe aliaj skribmaŝinoj. La sinsekvo de la literoj iras kompreneble de supre al malsupre, laŭ japana skribokutimo. La meĥanismo de tiu skribmaŝino mi ne tute komprenis, sed nur, ke eĉ la plej lerta tajpistino ne atingas la rapidecon de manskribo.

### Kial ne simple?

Krom la ĵus menciita skribmaŝino, ekzistas ankoraŭ alia speco, kiu estas konstruita same kiel nia latin-alfabeta, nome la katanaskribmaŝino. Ĉar la nombro de la silaboj (46) estas preskaŭ la sama kiel niaj grandaj kaj malgrandaj literoj kune, restas sufiĉe da klavoj por kelkaj kromsignoj, ciferoj kaj du supersignoj. Ankaŭ la manipulado kaj eĉ la skribdirekto estas la sama kiel ĉe nia normala skribmaŝino. Ĉar la silabosigno respondas ofte al 2 literoj alfabetaj, japana tajpistino povus almenaŭ 1½-foje tiel rapide skribi

Tekstofandmaŝino



kiel ŝia okcidenta koleginino. La maŝinoj estas jam uzataj por telegramoj — kial ne ankaŭ komerce kaj private?

La analogio: telegramo — komerca letero — privata letero — gazeto — libro — estas iom erariga. Kvankam ĉio servas por komunikado, la enhavo estas tre diferenca, speciale rilate la bezonatajn vortojn. Alia estas la kunteksto, alia la situacio jam konata kaj de la informanto, kaj de la informato. Telegramoj uzas ofte ripetiĝantajn frazetojn, kiujn oni povis simpligi al ĉifroj. Sammaniere oni tamen ne povas trakti poemon aŭ sciencan artikolon. Simile, la japana lingvo mem metas limon al la uzado de fonetika skribo: ĝi havas multege da samsonaj vortetoj (homonimoj) kun tre malsamaj signifoj. Ju pli altnivela estas la temo, des pli da homonimaj fakvortoj estas bezonataj. Ekzemple, por skribi la vorteton „ko“ ekzistas (laŭ poŝvortaro!) 51 malsamaj simboloj, depende de la signifo. La simila vorteto „koo“ (t.e. „ko“ kun longa „o“) havas eĉ 152 signifojn kaj tial ankaŭ kunmetaĵoj de vortoj povas esti dubigaj por la orelo. Ne por la okulo — almenaŭ se la vortoj estas skribitaj en ideografiaĵoj!

En Esperanto ni havas la vorteton „ujo“ kun 3 malsamaj signifoj: vazo, arbo kaj lando. Kvankam iuj lamentas pro tio, ni ankoraŭ ne bezonas helpi nin per ideografiaĵoj. Sed kion ni farus, se ujo havus 100 signifojn? Eble ni tamen komprenus la signifon helpe de la antaŭa vortradiko kaj la kunteksto. Se nun ankaŭ tiuj antaŭaj vortradikoj havus kelkdekajn signifojn? Tiam ni devus: aŭ reformi la lingvon, aŭ ekuzi diferencigajn simbolojn. Tamen, en Esperanto neniam povos estiĝi tiom da homonimoj — simple ĉar ni ne havas simbolojn por vivteni ilin. Kaj tio estas la fatala konsekvenco en la japana lingvo: Pro ekzisto de malsamaj simboloj la homonimoj ne ĝenas la leganton, kaj nun la homonimoj „postulas“ la pluekziston de la simboloj. Unu malgravan, iom similan kazon mi trovis ankaŭ en Esperanto: Internacia kutimo trudis al Esperanto la vorton „Miss“ (Miss Esperanto, Miss Mondo). Kompreneble, ni prononcas tiun vorton same kiel „mis-“, sed la leganton tio ne ĝenas. La okuloj vidas „alian“ vorton. Alkutimiĝinte, ni poste ne plu povos korekti la ortografion de tiu vorto de „Miss“ al „mis“. La homonimo kvazaŭ „postulas“ alian skribmanieron, ĉar ni akceptis ĝin.

La japanoj ricevis la plej multajn homonimojn el la malnova ĉina lingvo. La japana lingvo estas en sia origino tute ne parenca al la ĉina, kaj la japanoj prononcas simpligis la ĉinajn fremdvortojn kiuj venis samtempe kun ideografiaĵoj. Per tio malaperis la prononca diferenco kaj restis nur la skriba. Estas do malfacile, se ne maleble, forigi tiun lastan diferencigilon, la skriban.

### Reformaj projektoj

La ĉiuterena normigo kaj modernigo de la publika vivo alportis ankaŭ skriboreformajn movadojn. Ekzistas diversaj societoj kiuj proponas iom post iom transiri al fonetika skribado, esperante ke samgrade malaperos superfluaĵoj homonimoj. Eble anglaj fremdvortoj anstataŭos ilin. Iuj reformemuloj preferas fonetikan skribon per hiragana, aliaj per katakana pro simpleco, kaj triaj per latina alfabeto pro internacieco. En la japana Esp. gazeto „Revuo Orienta“ ofte aperas anonceto sub la slogano: La Internacia Lingvo — Esperanto. La Japana Lingvo — per kanasignoj! Inter la anoncoteksto presita en katakana sidas tamen pluraj ideografiaĵoj — evidente pro neceso en la nuntempa Japanujo. Mi ne scias, kiom da anoj havas la diversaj societoj skribo-reformaj, sed en gazetvendejoj eĉ ne unu gazeto reformskriba estas trovebla. Supozeble la publika interesiĝo estas malkuraĝige eta. Oni devas tie ne pretrevi gravan faktoron psihologian: Fonetike skribi scias ĉiu malsaĝa infano — kompreni kaj uzi simbolojn atestas spiritan maturecon kaj inteligentecon. Tiu imago sola jam sufiĉas por forpreni grandan porcion da prestiĝo de reformocelantoj. Ni konfesu, ke ankaŭ aliaj popoloj havas siajn fiksaĵn ideojn. Kial ni

## Inĝ. J. R. G. Isbrucker †



Nia estimata kaj ŝatata Inĝ. J. R. G. Isbrucker post longa malsano forpasis la 20-an de januaro pasinta. Multaj el ni konis lin persone, spertis lian ĉiaman afablecon kaj helpemon. Konsole niaj pensoj iras al liaj edzino, filinoj kaj genepoj. La 24-an de januaro multaj esperantistoj precipe el Hago estis kune en la kremaciejo Ockenburg por lastfoje saluti kaj honori Inĝ. Isbrucker, kies imago restos vivanta ne nur en niaj koroj, sed ankaŭ en la historio de Esperanto.

Gesinoroj Isbrucker ambaŭ esperantiĝis jam en 1909. Inĝ. Isbrucker estis iam prezidanto de la Haga Sekcio de L.E.N., fariĝis membro de la Akademio de Esperanto kaj poste ties Prezidanto (ĝis 1963). Li estis Komitatano de U.E.A., membro de la ekzamena Komitato kaj dufoje Prezidanto de Universala Kongreso en Hago, nome en 1920 kaj 1964. Cetero Gesinoroj Isbrucker ĉeestis preskaŭ ĉiujn Universalajn Kongresojn ĉie en la mondo, kie Inĝ. Isbrucker transdonis la salutojn de Nederlando kiel oficiala reprezentanto de la registaro. Ofte ni ĝuis la belajn lum-bildojn kaj rakontojn pri iliaj travivaĵoj.

Inĝ. Isbrucker estis aŭtoro de diversaj libroj: „La evoluo de la telefonio“, „Historio kaj organizo de la Esperantomovado (en 1948 modernigita en kunlaboro kun C. Stöp-Bowitz), „Esperanto-ekzamentaskoj kun tradukoj en la nederlanda lingvo“ (Ges. Isbrucker), kaj de diversaj broŝuroj, i.a. kontraŭ Ido.

Ankaŭ la tradukado ĝuis lian atenton: de Vondel „Gijsbrecht van Aemstel“ kaj „Josef en Dotan“; de van Limburg Brouwer „Akbar“ en kunlaboro kun lia edzino kaj J. Ziermans.

Inĝ. Isbrucker estis tre ŝatata klera prelegisto.

Kiel elektroteknika inĝeniero kaj poste docento kaj vicdirektoro de la Supera Teknika Lernejo en Hago Inĝ. Isbrucker povis uzi sian influon ĉe la nederlanda P.T.T., sekve de kio aperis esperantlingvaj indikiloj en poŝtofojejoj kaj publikaj telefonbudoj.

Nun venis fino al tiu laborriĉa vivo. Paca ripozo nun estu al li! Ni povos honori lin, imitante lian ekzemplon, daŭrigante lian laboron, ĉar la lasta grandega laboro pri nova vortaro Nederlanda-Esperanta restis nefinita.

Elsa Otto

uzas grandajn kaj malgrandajn literojn — ĉu la prononco ne estas la sama? Kial ni dividas la cirklon en 360 gradojn, la tagon en 24 horojn, kvankam ni havas dekuman kalkulsistemon? Kutimoj estas tre fortaj, kaj se ekzistas eĉ argumentoj pri ilia ekzisto-pravo — tiam reformdeziraj movadoj ne havas bonan ŝancon. Ni do ne miru, se la japanoj ankoraŭ por longa tempo restos malamikoj de la skribmaŝino.

W.Sch.



# PLEDO POR MONDCIVITANECO

Alfred KASTLER, Nobel-premiito pri fiziko,  
deklaris per la gazeto „Le Monde”:

„Proklami sin MONDOCIVITANO ŝajnas al mi hodiaŭ necesa sinteno en mondo, kies strukturoj estas transpaŝitaj.

Mi travivis la dramon de la loĝantaro de la Alzaca limlando disŝirita per du naciismoj kaj mi komprenis, ke estas absurde senfine daŭrigi militnaskantajn disputojn.

Kiel franca civitano mi opinias ke mia lando devas helpi, per ĉiuj rimedoj pri kiuj ĝi disponas, la malpli evoluintajn landojn kaj ke ĝi devas klopodi por regiĝi la etoson de konfido, kiu permesos haltigi la armilkonkuradon estiĝantan de la grandaj regnoj.

Kiel sciencisto mi scias ke la solvo de la problemoj, kiuj stariĝas antaŭ la sciencistoj de la diversaj landoj, estas la frukto de ilia intima kunlaborado. Kaj mi kredas, ke estas same sur la tereno de la teknikaj realigoj kaj de la ekonomiaj temoj.

En epoko dum kiu la liberigo de la nuklea energio disponigas al la homoj neimagitajn rimedojn por detruiri, sed ankaŭ por konstrui, en epoko dum kiu ekiĝas la granda planeda aventuro de la homaro, mi opinias, ke la homa socio devas doni al si instituciojn tutmondajn por haltigi militon kaj malsaton naskitajn de egoismo kaj malamego.

Kiel homo mi sentas min solidara kun ĉiuj homoj kaj mi pensas, ke ili devas unuiĝi por konstrui trans la rasaj kontrastoj kaj la ideologiaj kontraŭstaroj la homan civiton, kiun ni alvokas per ĉiuj niaj deziroj.”

Trad. Renée Volpelière

## Bestoj kiel veterprofetoj

El la konduto de la bestoj oni ofte povas konkludi la okazontajn veterŝanĝigojn.

Pri la hirundoj oni asertas, ke la vetero restos bona, se la hirundoj estas flugantaj alte en la aero. Sed se ili flugestas malalte, tiam certe baldaŭ pluvos.

La klarigo estas simpla: ĉe alproksimiĝo de pluva fronto, la supraj aertavoloj ekmoviĝas kaj malvarmiĝas. La insektoj, formantaj la nutraĵon de la hirundoj, estas devigataj fuĝi al pli malaltaj regionoj kaj sekve ankaŭ la hirundoj devas flugi malalte, por ke ili ne maltrafu siajn menuojn, kiujn ili cetere konsumas dum la flugado.

Ankaŭ la „aerĝlutado” de la fiŝoj antaŭdiras malbonan veteron. La fiŝoj fakte ne aeron „englutas”, sed kaptas insektojn, kiuj flugetas tuj super la akvospegulo.

Facile eblas, ke baldaŭ ekpluvos, kiam ni vidas, ke la talpo diligente faras „montetojn”. Multaj insektoj fuĝas sentemaj pro la proksimiĝonta pluvo en la teron kaj pro tio la talpo prenas por si novan ĉasterenon situantan pli alte ol kutime.

Generale ni povas diri, ke la bestoj pli baldaŭ rimarkas la eventualan ŝanĝiĝon de la vetero ol la homoj.

Tiel ni povas vidi, ke la anaso okupas sian neston antaŭ ol la vetero malvarmiĝas. La vetero estos pli varma, se la anasoj komencas grandamase bleki.

Ankaŭ la araneo havas delikatan antaŭsenton por la veterŝanĝigoj. Ĝi forlasas sian reton kaj serĉas rifuĝejon antaŭ ol la homo ion rimarkas pri la ŝanĝiĝonta vetero.

## Proteinoj el natura gaso

Du britaj petrol-sciencistoj, d-roj J. R. Norris kaj D. W. Ribbon, sukcesis ŝanĝi metanon — unu el la ĉefaj elementoj de natura gaso — en manĝeblajn proteinojn. La proteino produktas bakterio, kiu nutras sin ekskluzive per metano kaj eligas blankan, flokecan substancan kun protein-enhavo inter 40 kaj 50%. Tiun substancan, cetere sengustan, manĝis jam diversaj laboratorioj bestoj kaj ankaŭ je malgrandaj kvantoj, la sciencistoj mem.

Dum multaj jaroj du aliaj petrol-kompanioj same eksperimentadis por produkti proteinojn el la neuzablaj rezultoj de la naftorafina proceso. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

## Laseroj uzataj por rektigi tunel-boradon

Lasero-radioj estas nun jam uzataj por ebligi grandan precizecon dum tunel-borado. En Nova-Meksiko, Usono, irigacia tunelo de 2,4 km (1½ mejloj) deviis entute per ne pli ol 1,6 cm. (5/8 colo). La grandan precizecon oni ŝuldas ĉefe al rektigilo, kiu uzas gas-laseron.

La uzo de lasero anstataŭ de la lampoj normale uzataj dum tunel-konstruado donas tre potencon radion, kiu estas uzebla por pli grandaj distancoj kaj kiu eĉ penetras polvo-nubojn. La radio de la lasero trafas du fotoĉelojn muntitajn sur la bor-maŝino. Tio siavice briligas lampetojn sur kontrol-tabulo antaŭ la stiristo, kiu per ties helpo povas korekti devion tuj kiam ĝi komenciĝas. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

## Ĉu jordanianoj voĉdonos?

Atinginte „altan nivelon de kulturo kaj politika konscio”, jordanaj virinoj devus kontribui al la progresigo de demokratio. Tiel deklaris Reĝo Hussein de Jordano. La Reĝo petis la Ĉef-Ministron, Wasfi Tall, revizii la nunajn elektoleĝojn de Jordano por rajtigi al virinoj baloti. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

## Unua Internacia Foiro de Azio

La Unua Internacia Foiro de Azio okazos de 17 novembro ĝis 10 decembro en Bangkok sub aŭspicio de la Ekonomia Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj por Ekstrem-Oriento (ECAFE). (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

# Lernu per la eraroj!

„Sed, kiam ŝi vidis, ke al la partizanoj mankis vestoj, ŝi jam senhezite donis ilin al tiuj lastaj.”

Kion ŝi vidis? Ŝi vidis: al la partizanoj mankas vestoj. Krome, la laste menciitaj objektoj estas ĝuste la vestoj; tial la „precizigo” al tiuj lastaj neniom kontribuas al la klareco de la frazo. Sufiĉas „Sed, kiam ŝi vidis, ke al la partizanoj mankas vestoj, ŝi tuj donis al ili”. El la kunteksto ĉiu komprenas, ke ŝi donis la vestojn al la partizanoj.

„Li iris serĉi sian fraton en Parizo”.

El la rakonto estas klare, ke „li” bone scias la adreson de la frato. Serĉi ja signifas *peni por trovi!* Pro tio la ĝusta vorto estas ĉi tie *viziti*. Krome, el la rakonto estas ankaŭ videble, ke „li” tute ne iris, sed nur intencis iri. Do „Li volis viziti sian fraton en Parizo.”

„Sed vi . . . , ne bezonas anticipi *sin* provizi per vizo.”

Li, ŝi, ĝi, ili, oni, iu provizas *sin*, sed mi provizas min kaj *vi* provizas *vin*.

„De fremdlandaj turistoj oni postulas neniam *taksojn* por rajto de veturado, transporto de pakaĵoj, alveno en flughavenoj.”

*Taksi* havas du signifojn: 1) Difini la valoron, 2) Alte ŝati. Nek unu, nek alia signifo taŭgas ĉi tie. La turisto-konsilanto volis diri „. . . oni postulas neniam *depagojn* . . . ” (aŭ akcizojn, impostojn).

„La nepentrita domo estis *pentrita* (blua aŭ alikolora)”

*Pentri* — simile kiel *desegni* — signifas „reprezenti objektojn per linioj kaj koloroj”. Ne konfuzu do *pentri* kun *farbi* = *kolorigi!* Alie la frazo fariĝas dufoje paradoksa kaj la tuta Akademio ricevas kapdoloron.

„Post la dua Kvarjarplano por la *stratkonstruo* estas planite . . . pretkonstrui 3500 km da federaciaj *stratoj* kaj ŝanĝi 3000 km da distriktaj *stratoj* de unua rango je federaciaj *stratoj*.”

En Esperanto la vorto *strato* ne signifas „granda vojo”, sed: vojo *inter konstruaĵoj* en urbo aŭ vilaĝo. En la supra ekzemplo temas pri la tuta reto de vojoj tra la lando. Ĉie oni devus do meti aŭ vojoj aŭ ŝoseoj.

„. . . oni povis konstati *trodemandumon* kun *preztrigo* . . . ”

Oni povas troigi ankaŭ per vortkunmetoj. *Demando* estas „peto pri informo” aŭ „problemo pridiskutota”; pri la signifo de *demandumo* oni povas nur konjekti. Prezo povas esti tro alta (por la konsumantoj), sed ankaŭ tro malalta (por la produktantoj). Pli klare do: „. . . oni povis konstati tro grandan *varpostulon* kun *prezaltiĝoj* . . . ”

„La eksporto atingita dank’ al la kapabloj kaj la diligenteco de la *laborprenantoj* . . . ”

Iuj ĵonglaĵoj en nacilingvoj ne malvalidigas la uzadon de nia sufikso — *ist* —. Kelkfoje la signifo de . . . -prenanto fariĝas tute alia: instruisto — instruprenanto, poŝtisto — poŝtprenanto ktp.

Do „dank’ al . . . de la *laboristoj!*”

## 20-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1967

La ĉijara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en TORRE PELLICE, ITALUJO, de la 22-a ĝis la 29-a de julio, kio donas la eblecon, poste ĉeesti la U.K. en Tel Aviv.

Nia kongreso okazos en la centro Valdesa t.e. la centro de la Protestantoj en Italujo.

Torre Pellice situas okcidente de Torino, piede de la Alpoj. La regiono estas tre pitoreska kaj multe vizitata de turistoj. Tial estas necese frue aliĝi, por ke ni sciu, kiom da litoj ni devos rezervi. Post la 1-a de junio ni ne plu povos akcepti aliĝojn.

La kotizoj por partopreno de la kongreso, kun tranoktado, manĝado kaj unu tuttaga ekskurso sumiĝas:

1. Kongresano 130 ned. gld.
2. Edz(in)o de kongresano 115 ned. gld.
3. junulo ĝis 20 jaroj kun propraj enspezoj 125 ned. gld.
4. junulo ĝis 20 jaroj sen propraj enspezoj 115 ned. gld.

RABATO: Membroj de KELI de la kategorioj 1,3 kaj 4 rajtas rabaton de 10 ned. gld.

Edz(in)o de membro de KELI, kategorio 2, rajtas rabaton de 5 ned. gld.

Pliajn informojn donos al vi:

F-ino Putto,  
Schaapsweg 139, Ede (Gld.)  
NEDERLANDO

### Zamenhof-festo kaj memorigo de Homaj Rajtoj en Bologna

La Bologna-Esperanto-Grupo „Achille Tellini”, kunlabore kun Itala Fervojista Esperanto-Asocio „I.F.E.A.” organizis la Jaran datrevenon de la Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

La solena publika manifestacio okazis la 11-an de decembro en la salono „Edera” fare de Prof-ro Carlo Agostini, Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto. La salono estis ornamita per afiŝoj, eldonitaj de UNO kaj UNESCO por memori la Homajn Rajtojn kun la teksto en Esperanta lingvo.

Prof-ro Agostini substrekis la valoron de la Homaj Rajtoj kiuj jam en la pasintaj jarcentoj vekis la intereson de la sociologoj sed nur la 10-an de decembro 1948-a la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis en Parizo la „Internacian Deklaracion de Homaj Rajtoj”. La oratoro kunligis la vivon kaj sopiron de D-ro Zamenhof kiu per sia lingvo Esperanto tre helpis la homaron diskonigi tiujn homamajn sentojn. Li fermis sian paroladon klarigante la transdonon de la propono al UNO, okaze de la jaro de Internacia Kunlaboro, fare de UEA. Li substrekis ke UEA estas en konsultaj rilatoj kun UNESCO, kiu dum sia Ĝenerala Konferenco de la 10-a de decembro 1954-a aprobis la Rezolucion kiu rekonis „la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimiĝo de la popoloj de la mondo”.

IFA aparte memoris tiujn ĉi du datojn, nome la 107-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kaj la 18-an datrevenon de la Internacia Deklaracio de Homaj Rajtoj, la 16-an de decembro dum la Esperanto-kursoj organizitaj de „Dopolavoro Ferroviario” ĉe la Profesia Lernejo de Ŝtataj Fervojoj ĉe la centra stacidomo en Bologna.

La instruistino Delvina Gimelli per taŭgaj vortoj ilustris al la gekursanoj la du okazintaĵojn. La Prezidanto de „Dopolavoro Ferroviario” S-ro Ceci fermis la manifestacion per vortoj kiuj evidentigis la valoron de la Zamenhofa idealo por la paco inter la popoloj, fine li bondeziris kaj gratulis la gekursanojn dum refreŝigaĵo regalita de la organizajo.

G. Gimelli

### Esperanto kiel pontlingvo por Rustaveli

Ankaŭ en Hungarlando oni memoris la okcidentan naskiĝtagon de la fama gruza poeto Rustaveli, kiun oni aparte solenis en lia patrujo per Gruza Festa Semajno kaj internacia verkista renkontiĝo. Je tiu okazo oni memoris pri tio, ke la unua traduko de la fama epopeo de Rustaveli: „La panterfelta kavaliro” estas verko de hungara scienculo, poeto kaj tradukisto, akademiano Béla Vikár. Sed malmultaj scias — eĉ inter la nunaj esperantistoj — ke Vikár verkis sian majstran tradukon per helpo de Esperanto kaj li mem fariĝis serioza esperantisto. Li eĉ verkis hungaran poemon pri Esperanto kaj poste pri prelato Giesswein, tiutempe prezidanto de Hungarlanda Esperanto-societo. Ĝuste Giesswein atentigis lin pri la utilo de la Lingvo Internacia.

Vikár mem rakontis tion en ĉefartikolo de la revuo Hungara Heroldo — redaktita de prof. Ludoviko Kökény, nun ĉefredaktoro de nia Hungara Vivo — en ties februara numero en 1928.

Tiutempe neniu konis en Hungarlando ion pri la fama epopeo. Vikár jam sukcese tradukis la epopeon finnan Kalevala en la hungaran lingvon. Lia amiko, la fama pentristo, kiu faris desegnaĵojn al „La Tragedio de l'Homo”, Mihály Zichy atentigis lin, ke Vikár traduku ankaŭ la nomitan tre valoran gruzan epopeon, por kiu Zichy — kiu vivis en tiutempa Sankta Peterburgo — laŭ propra deklaro pretigis siajn plej sukcesajn desegnaĵojn. Vikár akiris la tiam solan gramatikon de la georgia lingvo kaj studis ĝin. La germana instrulibro prezentis la nunan gruzan lingvon kaj — la epopeo estis en la pralingvo malnovaĝa. La studo ŝajnis vana Vikár unue malesperis: li do vane lernis! Li ekpensis, ke iu el Gruzio povus helpi al li kaj provis inviti gruzan verkiston por tiu celo. Sed vane li klopodis. Per la Scienca Akademio li petis eĉ ĉe la konsulo en Tiflis. Tiam rekomendis al li Giesswein: li provu ĉe la Esperantista Grupo en Tiflis. Kaj jen miraklo: konata esperantista poeto, gruzo literaturisto, la juna Ciskalauri estis preta akcepti la inviton. Vikár eklernis Esperanton kaj kiam la sperta gruzo literaturkonato alvenis, ili jam povis dum duonjaro ĉiuposttagmeze 4 horojn dediĉi al la konatiĝo de tiu majstro-verko. Tio estis tre pena kaj temporaba afero; li mem konfesis tion, li ja estis ankaŭ — kiel eminenta stenografo — estro de la Parlamenta Stenografika Oficejo en Budapeŝto, kio postulis multan laboron. Sed — kiel li mem esprimis — dank' al Esperanto li povis enrigardi en la spiriton de tiu granda gruzo poeto kaj la interpreto sukcesis bonege. Ni aldonu, ke de tiu tempo oni pretigis jam du aliajn tradukojn de „La panterfela kavaliro” en la hungaran lingvon. Sed Vikár aldonis, ke li fariĝis fervora adepto de Esperanto kaj ne nur unufoje spertis, ke eĉ la kono de proksimume dudek lingvoj ne sufiĉas en la internacia interkompreniĝo!

Ni ankaŭ konigu, ke Vikár naskiĝis en 1859 — do estis samaĝulo de Zamenhof — en hungara vilaĝo Hetés kaj jam tie ekŝatis la kantojn kaj poemojn. Li fariĝis grava folkloristo kaj kolektis per tiutempa fonografo tra la lando hungarajn popolkantojn — do antaŭis la postan gravan agadon de Bartók kaj Kodaly. Jam en sia dudeka jaro li legis

finne, kaj en Finnlando esploris la elparolon kaj ritmon de la Kalevala-kantistoj! Kiam en 1905 aperis la plena Kalevala, li fariĝis membro de la Finna Scienca Akademio kaj Helsinki akceptis lin en flag-pompo. Je lia honoro estis festprezentado en la Finna Opero kaj Vikár rigardis ĝin en la loĝio kune kun la finna ŝtatestro.

Vikár vere estis danko al Esperanto kaj kiam estis okazo, prezentis ĝin. Ekzemple — kiel ĝenerala sekretario de la hungara literatura societo La Fontaine, kiun li fondis, kiel grava akcelanto de la franca literaturo en Hungarlando — li dum ties publikaj teatraj prezentadoj enprogramigis poemojn en Esperanto. Mi bone memoras, kiam en la Teatro Urania eksonis en Esperanto la poemo de Petófi: La millibera leono...! Li estis unu el la honorprezidantoj de la Mondkongreso en Budapeŝto en 1929 kaj membro de la komitato de la Budapeŝta Esperanto-Grupo.

Jen la okcidentara gruzo poeto Rustaveli tiamaniere donakis al nia movado tiun ĉi mildkoran, persistan kaj poezi-animan scienculon kaj Esperanto donis al la hungara popolo nekonatan ĉefverkon de nekonata malgranda popolo — trezoron de la mond-literaturo!

P.B.

Maria Laade

### Rememoroj al mia infaneco

Dum la grandaj somerlibertempoj de la lernejo miaj gepatroj kaj mi veturadis dum multaj jaroj en vilaĝon situantan idlie ĉe la Balta Maro, kie ni travivis belegajn horojn, liberigitaj de la tiama morala opinio, pri kiu ni hodiaŭ povas nur rideti. Oni legu kaj miru: En grandega banloko miaj gepatroj estis denuncitaj, ĉar ili permesis, ke mi — havante 3 jarojn — ludis ĉe la marbordo kiel nudulino! Kaj en tiu granda banloko mi ĉiam denove ploregis pro la daŭra vestiĝado aŭ ŝanĝo de vestoj. Sed tie sur la kamparo dum ses semajnoj mi povis vivi sen ŝuoj kaj ŝtrumpoj, sen la devigo de migranta modoĵurnalo, libera kaj nelimigita. Kia feliĉego por infanoj, speciale por grandurbaj infanoj! Por mia patrino tia feliĉego certe ne ekzistis, ĉar la vivcirkonstancoj estis tro primitivaj: ŝi devis kuiri je fajrujo, kiu kelkfoje brulis bonege kaj kelkfoje tute ne; ni devis kunpreni ĉiujn vazarojn, potojn, la vestojn, niajn litojn ktp. ktp., tiel ke ni bezonis la plej grandan vojaĝo-korbon. Sed tamen, vidinte kiel la palaj vangoj de sia infaneto ruĝiĝis kaj la tuta korpo brunigis kvazaŭ negro, ŝi forgesis ĉiujn penadojn pro tia ĝojo.

En tiu vilaĝo oni povis sendube konstati, kiam ekvenis nova gasto. Precize unu tagon antaŭ lia alveno oni kolorigis la fenestrojn — sen forigado de la malnova koloro, tiel ke dum multaj jaroj la kolorsedimento fariĝis tiel dika, ke la fenestroj tute ne plu estis fermeblaj, sed ankaŭ ne plu malfermeblaj pro gluado de la nova, tro freŝa koloro; do ĉiam estis malfermita fendo. Certe ĉiu povas imagi, ke per tia fendo ĉiam estis sufiĉe freŝa aero en la ĉambro.

Ke sur kamparo vivas ankaŭ musoj, ni kompreneble scias. Sed unu jaron ni devis suferi tiom multe pro ili, ke ni ne plu povis dormi, ke oni ne povis restlasi ion manĝeblan, eĉ ne en ŝranko, kiu cetere ankaŭ ne estis firme fermebla. Tial ni uzis kaptilojn, per kiuj ni kaptis dekuojn da musoj. Estis timige! Subite, ekzamenante nian ĉambron, ni eltrovis en la muro truon havantan grandecon de briko, tra kiu ni ja allogis per nia lardo multegajn musojn el la kampoj. Rakontante tion al nia gastiganto, li respondis: „Ho jes, tion mi scias; mi mem forigis tiun ŝtonon, por ke freŝa aero povu enveni en la ĉambron” (vidu supre!!).

# Japania Socialista Partio projektas enkonduki Esperanton en la ĝeneralan edukadon en Japanujo

La Socialista Partio, kiu estas opozicia partio laŭnombro la plej supera en la politika kampo de Japanujo, publikigis la 19-an de nov., 1966, la reform-projekton pri edukado sub la titolo: „Unua Projekto de Baza Plano por Reformo de la Eduka Sistemo”. Al tiu novaĵo la japana gazetaro de la sekvanta tago dediĉis multekolonan spacan por porti artikolojn kun la resumo de la projekto. Kio precipe kaptis nian atenton estas la fakto, ke la projekto, ellaborita de la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo de la nomita partio, enhavas ĉapitron, en kiu la instruado de Esperanto estas eksplicite regulita en la programo de deviga „ĝenerala edukado” en Japanujo.

La nuntempa edukado en Japanujo estas bazita sur la tiel nomata sistemo de 6-3-3-4, efektiva nelonge post la fino de la dua mondmilito: nome, la 6-jara Elementa Lernejo, 3-jara Mezlernejo, 3-jara Altlernejo kaj 4-jara Universitato. El tiuj kvar lernejoj etapo, la du unuaj, 6 kaj 3 (sume: 9 jaroj) formas la devigan edukadon.

Al tio, la socialistoj kontraŭmetas la projekton de nova sistemo, laŭ kiu la jarkonsistoj entute fariĝas pli ampleksaj: 4-5-5-4, kun enklasio ankoraŭ de la pli junaj aĝogrupoj ol ĝis nun, tiel, ke la periodo de deviga edukado plilongigas ĝis 14 (4-5-5) jaroj.

La diversetapaj lernejoj, fondotaj laŭ la socialista plano, nomiĝas: (provizoraj nomoj) — Infanlernejo, Popollernejo, Sintezo Lernejo por Scienco kaj Tekniko, kaj Universitato.

Unue, la Infanlernejo estas 4-jara, deviga por ĝeinfanoj en la aĝo-grupoj de 4 ĝis 7 jaroj (respondantaj, en la ekzistanta sistemo, al la infanoj respektive de l'infanvar-tejo kaj la kindergarteno, kaj al la klasoj 1-a kaj 2-a de l'elementa lernejo); due, la Popollernejo estas 5-jara, deviga por geknaboj en la aĝo-grupoj de 8 ĝis 12 jaroj (respondantaj al la nunaj klasoj 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a de l'elementa lernejo kaj la klaso 1-a de la mezlernejo); trie, la Sintezo lernejo por Scienco kaj Tekniko estas 5-jara, deviga por geknaboj en la aĝo-grupoj de 13 ĝis 17 jaroj (respondantaj al la nunaj klasoj 2-a kaj 3-a de la mezlernejo kaj ĉiuj tri klasoj de l'altlernejo); fine, 4 jaroj aŭ pli, laŭcirkonstanco, de l'universitato.

Tiel, la 4-jaran edukadon por infanoj sekvas la 10-jara „ĝenerala edukado”, konsistanta el du periodoj: kiel unua-perioda, la 5-jara Popollernejo, kaj kiel dua-perioda, la

5-jara Sintezo Lernejo por Scienco kaj Tekniko. Kaj en la Popollernejo — la socialistoj projektas enkonduki la lingvon Esperanto, kiel devigan lernobjekton, **por profundi la internacian komprenon, kiel ankaŭ por propedeŭtiko al la instruado de fremdaj nacilingvoj.**

Rilate la motivojn por la instruado de Esperanto kiel deviga leciono, la socialistoj substrekas tri jenajn punktojn:

1. La instruado de Esperanto estas efika kiel propedeŭtiko al la instruado de fremdaj nacilingvoj. (Eksperimentoj pruvas, ke la lernintoj de Esperanto ellernas pli rapide la anglan lingvon.)

2. Per la nov-sistemo 10-jara ĝenerala edukado, kiu estas deviga, ni celas la formadon de la internacikonsciaj japanoj, kiuj, mastrante la patrinan lingvon ĝustamaniere, scipovas Esperanton kiel la duan lingvon, kaj ellernas ankoraŭ unu el la fremdaj nacilingvoj.

3. Per la ekzemplo, ke ni japanoj ĉiuj ellernas Esperanton, ni deziras plenumi la pioniran rolon por la disvastigo kaj de la ideo de mondpaco kaj de la komuna lingvo de la mondo. La lingvo Esperanto estis elpensita de D-ro Zamenhof, Pollando, en la jaro 1887. Kiel komuna lingvo de la homaro, ĝi ligiĝis kun diversaj ideoj de mondpaco, kaj jam havas internaciajn organizojn. La japana popolo, kiu alte tenas la Packonstitucion kaj aspiras plenumi la pioniran rolon ankaŭ por la starigo de Mondfederacio, devas ellerni Esperanton kaj samtempe proponi al ĉiuj regnoj de la mondo, ke ĝi estu la komuna lingvo ĉe ĉiuj internaciaj konferencoj.

Kio precize movis la Socialistan Partion ja enmeti Esperanton — tiel bele! — en sian propran edukan programon, pri tio ni ankoraŭ ne scias. Sed ni flatas nin pensante, ke ne restis tute senutilaj la diversaj Esperanto-propagandiloj, kiujn ni sendis, laŭpete, al la Estro de la supre menciita Politika Komitato de la Socialista Partio. (Cetere, vidu la frontartikolon de „Oomoto”, N-ro marto-aprilo, 1966). Kaj el ĝenerala vidpunkto, oni povus citi kelkajn faktorojn, kiuj al tio kontribuis: la Jaro de Internacia Kunlaboro, 1965; la Kampanjoj por la UEA-Propono al la Unuiĝintaj Nacioj kaj por la EPA-Peticio al la Japana Parlamento; la 50-a Universala Kongreso en Tokio; la propaganda agado kaj

la ĝenerala interesiĝo de publiko pri Esperanto en ligo kun la supre cititaj eventoj.

La „Unua Projekto” de la Japana Socialista Partio nun estas ankoraŭ nura projekto. Eĉ antaŭ ol doni al ĝi definitivajn formojn, la Partio ankoraŭ prilaboros ĝin, kaj devos prezenti ĝin por ĝenerala aprobo de sia kongreso en decembro, 1967; poste oni disvolvos 20-jaran „Movadon por Edukado” kun la celo „komplete efektiviĝi la planon ĝis la fino de tiu periodo”.

Kvankam la specialista reago — individua kaj kolektiva — al la Projekto baldaŭ venos, la gazetara jam aperis en la sekvantaj tagoj per publikigo de redakciaj (anonimaj) komentoj en la regulaj kolumnoj — kelkaj kun aparta mencio pri Esperanto. Jen kelkaj fragmentoj el tiuj:

„Kia agrabla ideo instrui Esperanton al la junaj lernejoj!” — Joriuri Sinbun (en „Henšuu-teĉoo”) 21 nov., '66.

„Preskaŭ cent jarojn post la publikigo de Esperanto, ĝi ankoraŭ ne estas adoptita kiel oficiala lingvo eĉ ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Se la projekto realiĝos, tiam la japana popolo fariĝos pioniro por la disvastigo de la mondlingvo. Tiel okazos, ke en la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis Esperanto.” — Mainiĉi Sinbun (en „Joroku”) 24 nov., '66.

„Cetere, ni dubas, ĉu Esperanto taŭgas aŭ ne kiel propedeŭtiko por la fremdaj lingvoj. Esperanto estis iniciatita de d-ro Zamenhof, Pollando, en la jaro 1887. Ni scias ankaŭ, ke ĝi estas sintezita el lingvoj de Eŭropo. Tamen, ĉu iu lingvo, sole pro tio, ke ĝi estas lingvo sintezita, kapablas funkcii kiel propedeŭtiko por la fremdaj lingvoj? La opinio de lingvistoj pri la demando ni ŝatus aŭskulti”. — Kioto Sinbun (en „Bongo”) 21 nov., '66. (Por iom klerigi la redakcion de Kioto Sinbun tiurilate, ni tuj skribis leteron kaj sendis ĝin, kune kun abundo da materialo pri Esperanto, al la redakcio.)

Kiel ajn estu, la publikigo de la socialista projekto pri enkonduko de Esperanto en la japanan ĝeneralan edukadon certe estas bonvena por la intereso de nia afero. Ni, niaflanke, subtenados ĝin per ĉiuj rimedoj kaj klopodos por ĝia sukcesigo. Kaj ni nun petas al niaj karaj legantoj: bonvolu skribi al S-ro Gorō Jamanaka, Estro de la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo, la Socialista Partio, 1-1 Nagata-tyō, Tiyoda-ku, Tokio, Japanujo — por montri al li kaj liaj sampartianoj, ke ilia iniciato estas mondscale bonvenigata kaj subtenata!

Oomoto

## daŭrigo de „Rememoroj al mia infaneco”

Certe multaj homoj scias, ke en antaŭaj tempoj komercistoj tramigris la vilaĝojn (ni ŝerce diris „kun ventra magazeno”). Unu tagon tia nomadanta, vaganta vendisto venis ankaŭ en nian vilaĝon. Post longa plena parolado li sukcesis vendi ion al nia mastri-no. Kiel rekompenco li postulis ne monon, sed la virkoko fiero irantan sur la korto. Anstataŭ atendi ĝis vespero, kiam la birdaro estas en la stalo, ambaŭ — la komercisto kaj nia mastro — provis kapti la virkoko. Ĉi tien kaj tien ili ĉasis, ĉiam denove la virkoko forflugis, ĝis kiam ĝi fine estis sur la pinto de la sterkejo. Kun plej granda diplomatio — iom post iom per helpo de la tuta familio — la virkoko tie estis ĉirkaŭata kaj nia mastro devus kapti ĝin: „Nu, patro, nun ekkaptu ĝin, nun vi sukcesos!” Kaj tiel li nun ankaŭ faris. Unu, du, tri: unu salton, unu ekkapton — kaj la virkoko kun kokeriko

ekflugis alten kaj — la kamparano falis en la sterkejon aŭ pli ĝuste en la putran fluidadon.

Ĉiujare dum aŭgusto, en la plej proksima urbo estis foiro, la granda okazaĵo de la tuta jaro. Ankaŭ nia mastra familio ne preter-lasis partoprenadon kaj samtempajn aĉetojn. Plej ofte oni prokrastis tiujn aĉetojn ĝis la lasta tago esperante, ke tiam la vendistoj — jam duone formarsante — donus rabatojn. Poste oni montris al ni ĝoĝe la faritajn akiraĵojn, kiujn ni devis prijuĝi. Iun jaron oni nun montris al ni la novajn ŝtrumpojn. Subite krio: unu ŝtrumpo estis por ŝugrandeco 36, la alia por 41! — Kaj nun la foiro estis finita, tiel ke oni ne plu povis interŝanĝi. „Nun ili do trompis min!” ekkriis nia mastro furioze. Sed ni, ni povis nenion alian ol ridi, ridegi, pri la „malkara” aĉeto!

## La subskribokampanjo

POR LA PROPONO AL U.N.

(vidu „La Praktiko”, novembro 1966) estas daŭrigata!

Aldonaj raportoj pri pliaj nombroj da subskriboj estos senditaj al U.N. Helpu kompletigi la milionon! Petu subskribofoliojn de la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

## HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esp.-kursoj okazos 23.—30. julio en La Internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon de vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
Åbyhoj, Danlando.

N.B. Aŭtunaj feriaj Esp.-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.-21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

Julio Baghy

## Blinda forĝisto

*La vivo, ĉi forĝisto blinda, senindulga,  
nin marteladas sur amboŝ de l' histori';  
sub ĉiu sortobat' forfalas la skori':  
sopir' kaj cel', ... Sufokas Volon feĉo fulga.*

*Frakase peze forĝe falas ĉiu bato  
ĝis ili formas nin — o b e a materi'  
kaj vanas spito, ve', ribelo, helpokri';  
el ni kreiĝas sklavo-ĉen' por homa frato.*

*Jes, ĉi forĝisto blinda sin maŝine movas  
iabrikas nur ĉeneron plian post ĉener' ...  
Hometo, kial do mensogi pri l' liber',  
se vivo mem produkti n u r katenojn povas?!*

## KONKURSAJ PREMIOJ

Listo de la libroj, el kiuj ĉiu premiito povas elekti en la valoro de sia premio. — Oni povas elekti ankaŭ en pli alta valoro, sed tiam oni devas alpagi la diferencon. — Libroj ne troveblaj en ĉi tiu listo ne estas doneblaj premie. — Petoj por esceptoj ne estas atentataj. — La libroj estas sendataj afrankite.

Steloj

Angla Antologio. 1100-1800, 319 p. bind. ....	40.—
Atta Troll. Somernokta sonĝo, de H. Heine. Trad. Zanoni ..	3.—
Aŭstralio. Lando kaj popolo. (Delsudo & Laiho) Ilustrita ..	10.—
Esp. Biblioteko Internacia. N-roj 1-9, 12, 13, 16-18, 20-22, 24-28, 32, 33 .....	1.—
Esperanto-lernolibro por popollernejoj. (Degen), il. ....	4.—
Evoluo de la telefonio. Ing. J. R. G. Isbrucker, il. ....	4.—
Inferio. H. J. Bulthuis. Originala romano, 147 p. ....	14.—
Internacia Mondliteraturo. N-roj 1-8, 10-16, 18-21 ....	3.—
Koncerta kantaro. Kun notoj por fortepiano .....	11.—
Kristo interne de vi (trad. s-ino Onnen-Onnen) .....	12.—
La cikoni-kalifo. M. Babits. Hungara romano .....	6.—
La enigmoj. Libreto kun enigmoj por lerni novajn vortojn	0.60
La kantistino. W. Hauff. Germana novelo, tr. Wüster ....	2.—
Kaŭkazaj rakontoj. M. Lermontov. Ekscitaj .....	20.—
La malŝparulo. Teatraĵeto de F. Raimund. Trad. F. Zwach	5.—
La Praktiko. Nebinditaj jarkolektoj: .....	1964 20.—
.....	1965, 1966 po 30.—
La Reĝo Judea. La dramo de Jesuo. K.R., tr. Devjatnin, broŝ.	5.—
La sunkrono. M. Koenen. Nederlanda romano, 100 p. bind.	8.—
La tutmonda ĉefestraro, vojo al mondpaco. M. W. Polak ..	4.—
La vendreda klubo. 11 div. originalaj artikoloj .....	6.—
Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro. bind. ....	50.—
Miraklaj aventuroj de s-ro Longkrurulo. Kun bildoj .....	5.—
Modesta Bukedo. K. Jost. Prozaĵoj kaj poeziaĵoj .....	4.—
Natan la saĝulo. Drama poemo de Lessing. Trad. K. Minor	4.—
Pri varmekulturo. (Per varmo al sano). D-ro W. Wünsch ..	3.—
Societa ludaro, por hejmo kaj ekskurso (Rosenberg) .....	2.—
Solandro. Rakonto de W. Bonsels. Trad. D-ro E. Sós .....	1.80
Tragiek en triomf van Zamenhof (Privat — Belinfante) ....	8.—
★	
Belarto I. Literatura revuo .....	8.—
Belarto II. Literatura revuo .....	8.—
Božena Němcová. Monografieto .....	1.—
Dio rekompencu vin! Komedio (Camargo) .....	12.—
Disko: Festparolado (Ivo Lapenna) .....	12.—
Disko: Internacia elparolo .....	6.—
Disko: Salutparoladoj (49-a Univ. Kongr.) .....	6.—
Disko: La Feliĉo kaj 6 aliaj kantoj (R. van Dalsem) .....	10.—
Erna. Rakonto (Slösser-Bresler) .....	6.—
ESPERANTO. Binditaj jarkolektoj:	
1953, 1954, 1955 .....	po 12.—
1959, 1960 .....	po 36.—

1961 (inkluzivas „Belarto" II) .....	50.—
1962 .....	42.—
1963, 1964 (kun jarkolektoj de Monda Kulturo) .....	po 80.—
1965 .....	56.—
Estonta Eduko. Pedagogio (Ferrière) .....	3.60
Fajrolumo en la fronto (Liu Beĵü) .....	8.—
Faktoj pri Islando .....	10.—
Fervoja Terminaro (Roshier) .....	4.80
Galileo Galilei. Biografio (J. Caraça) .....	6.80
Gastronomia Terminaro (E. Urban) .....	13.—
Historio de Nederlando (A. da Silva) .....	2.—
Historio de Usono (A. da Silva) .....	2.—
Infanoj ne konas limojn. Fotolibro .....	11.80
Insigno de UEA kun broĉo aŭ butono .....	6.—
Kantoj de sovetaĵ komponistoj .....	6.—
Kantu kune! Polaj kaj aliaj kantoj .....	6.—
Kial venkis Esperanto (L. Ĵirkov) .....	2.—
Kvindek fabloj de Ezopo (K. Nakagaki) .....	4.40
La Budhismo (A. da Silva) .....	2.—
La Portugala literaturo (A. da Silva) .....	2.—
La Prahistoria arto (A. da Silva) .....	2.—
La Revolucia homo en la kosma epoko .....	1.—
La Vojo. Muzikfolio (Zamenhof/Molenaar) .....	1.—
Marista Terminaro (Clissold) .....	3.60
Meteorologia Terminaro (Lewin) .....	6.—
Meteoro. Teatraĵo (P. Karvaš) .....	6.—
Militista vortareto 5-lingva (Bastien) .....	4.80
Monda Kulturo. N-roj 1 ĝis 9, unuope po .....	2.50
N-ro 10 ĝis 15, unuope po .....	3.50
Nebinditaj kolektoj: 1963-1964 (9 n-roj) .....	17.50
.....	1965-1966 (6 n-roj) 20.—
La naŭzo. J.-P. Sartre. Neordinara romano .....	47.—
Nederlando. Bildlibro (Romijn/Scherer) .....	14.—
Oriento kaj Okcidento (Fradier) .....	6.—
Pro 3 pingvenaj ovoĵoj. En Antarkto. ....	2.—
Rakontoj pri Nederlando. (Duhamel) .....	7.—
Sekretoj de la marestaĵoj. (P. Giunio) .....	20.—
Socia filozofio, I: (Univ. principoj) .....	1.60
Sovaĝa herbaro. (Lusin) .....	4.—
Ŝlosiloj: persa, portugala, romanĉa, sudafrika, sveda ..	po 1.60
Teknika Terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj (A. Broise) .....	15.—
Totala sunklipso (M. Ljubić) .....	7.20
UNESCO-kurieroj. Artikoloj pri Esp.	
1959 (Decembro): Angla, Hispana .....	po 2.—
1963 (Junio): Angla, Araba, Franca, Germana, Itala ....	po 2.—
Vagado sub palmoj (J. Ribillard) .....	10.—
Vivo de Nansen. Biografio (A. da Silva) .....	2.—
Vivo de Pissarro. Biografio (A. da Silva) .....	2.—
Vivo de Zola. Biografio (A. da Silva) .....	8.—
Vivo kaj arto de Goja. Biografio (A. da Silva) .....	2.—
Zamenhof-gravuraĵo. (Rossetti) .....	3.—



## 669-a konkurso

### PROVERBOJ MISCITITAJ

Mia amiko Babil Babilov ĉiam diradis, ke multegajn proverbojn Esperantajn li scias parkere. „Fanfaronulo”, mi diris al li, „vi eĉ ne konas dek proverbojn — ĉu ni vetu?” Kaj ni vetis unu botelon da biero. Mi perdis; ĉar rapide, senhezite, li surpaserigis dek proverbojn — aŭtentike Zamenhofajn, li ĵuris. Longe poste mi relegis la proverbojn kaj ŝajnis al mi, ke rilate aŭtentikecon mi estas trompita. Ve, mankas al mi la pruvoj — ĉu vi povas eltrovi la veran tekston de tiu proverbo-deko?

1. En malsata familio mankas eĉ viskio.
2. Plej facile promeso rimiĝas kun kongreso.
3. Perdinta la harojn pri kombilo ne ploras.
4. En landoj transmaraj estas nelegeblaj horaroj.
5. Malantaŭ plena skribotablo ĉiu estas malafabla.
6. Policon evitu, bopatrino ne incitu.
7. Biera opinio montriĝas eĉ ebrio.
8. Ni instruas najbaron, kiu faris eraron.
9. Inter la blonduloj, reĝas la strebuloj.
10. En itist-salono parolu pri Vaŝingtono.

Provu trovi la Zamenhofan Esperanto-proverbon kiu servas kiel ŝablono. Por ĉiu miscitita proverbo ĝi estas alia. Viajn solvojn sendu rekte al la redaktoro de La Praktiko: Wilhelm Schmid, 4537 Ooaza Kurohama, Hasuda-mati, Saitama-ken, Japanujo.

(Responde al kelkaj demandintoj: Kurohama estas vilaĝeto apartenanta al la provinca urbo Hasuda; Saitama estas gubernio. Ne estas kutimo en Japanujo substreki la nomon de la urbo. Pluraj domoj povas havi la saman domnumeron; do neniam forgesu skribi la nomon!)

## KONKURSAJ SOLVOJ

### 663-a konkurso

Tiu ĉi krucvortenigmo el la numero Julio/Aŭgusto 1966 ne liveris multajn malfacilaĵojn, kvankam unu radiko, *anel'*, troviĝas nur en kelkaj nacilingvaj Esperanto-vortaroj, sed ne en Plena Vortaro. Kiu ĝuste enmetis la horizontalajn vortojn, tiu aŭtomate ricevis ankaŭ tiun vertikalan radikon. Aliaj ne trovis la radikon *eman'* kaj eĉ ne divenis *spiko*. La ĝusta solvo estas

K R E T E N A J  
R E T O R I K O  
E M A N O N  
V I P T A N G  
I R T E N I L  
F A L E T I  
G R A T U L  
R E T A R P S  
A M O R Ĉ A P  
N B F I N I  
D U O N E F I K  
A R S E N I K O

Kahlil Gibran

## Viaj gefiloj

Viaj gefiloj ne estas viaj gefiloj.  
Ili estas la filoj kaj tilinoj de la Vivo esprimiĝanta.  
Ili venas per vi sed ne de vi.  
Kaj kvankam ili estas kun vi ili ne apartenas al vi.

Vi povas doni al ili vian amon sed ne viajn pensojn, ĉar ili havas siajn proprajn pensojn.

Vi povas endomigi iliajn korpojn sed ne iliajn animojn, ĉar iliaj animoj loĝas en la domo de l' estonto, kiun vi ne povas viziti eĉ dum viaj revoj.

Vi povas klopodi esti kiel ili, sed ne strebu fari ilin kiel vi, ĉar vivo ne malantaŭeniras nek malfruiĝas kun la hieraŭo.

Vi estas la pafarkoj el kiuj viaj gefiloj estas ĵetataj kiel vivantaj sagoj.

Permesu ke via flekso en la mano de la pafarkanto estu por gajo.

Tradukis el la angla Rubén Feldman González

## ĜUU

historian, antikvan, modernan, pitoreskan, kulturalan, primitivan, kolorriĉan, dezertan, malgrandan, grandiozan, kontrastoplenan — unuvorte — interesege landon :

## ISRAELO

Partoprenu la aviadilajn kongresvojaĝon de U.E.A. de 30.7 ĝis 20.8.1967. Komforta dumkongresa restado en Tel Aviv. Dek postkongresaj tagoj por konatiĝi kun la tuta lando.

Petu detalajn informojn ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

Per senerara solvo akiris kvar poentojn:

B. Aleksič, Ljubljana; Arnould, Neuville-les-Voisys; H. Bolduc, Québec; E. Bonnafous, Carpentras; E. Calvet P., Tarragona; M. Casanoves, Cervera; E. Castell, Ryd; A. Conti, Asti; O. Czech, Würzburg; F. C. v. Dijk, Utrecht; P. Durette, St.-Sulpice; R. Felby, Hvidovre; K. Franc, Pardubice; G. Gimelli, Bologna; A. V. R. King, Bristol; P. L. Kiš, Karlovac; M. Laade, Berlin; H. Lavallée, Le Havre; L. Lehtola, Honkilahti; F. Maderyc, Havirov; H. Manske, Berlin; O. Matriciani, Düsseldorf; E. Maynar, Zaragoza; R. MacGrath, Mount Pleasant; R. Milon, Brive; L. Pannier, Tours; N. J. Persson, Eslöv; R. Raynaud, Ales; A. G. Rickwood, W. Croydon; A. Rihn, Mulhouse; G. Saggioli, Padova; F. Salvatore, Padova; A. Silenieks, Riga; F. Smit, Haarlem; T. Szász, St. Gheorghe; M. Urban, Deĉin; B. A. Velez, Goce Delĉev; E. Wissmann, Onstmettingen.

Respondoj al kelkaj demandoj pri la konkursoj:

Dem.: La Suplemento al la Plena Vortaro estas elĉerpita: kial vi tamen rekomendas ĝin kiel fonton por enigmo-verkantoj kaj enigmo-solvantoj?

Resp.: La Suplemento estas elĉerpita nur kiel aparta broŝuro, sed en la nuntempe vendataj Plenaj Vortaroj (aĉeteblaj je du formatoj) ĝi jam enestas malantaŭ la reprodukta ĉefparto. La vortaro malnova pretiĝis en 1933, do antaŭ pli ol 30 jaroj. Suplemento do estis necesa por kompletigo kaj kelkaj korektoj; eĉ kelkaj Zamenhofaj vortoj mankis en la malnovaj eldonoj!

Dem.: Ĉu la poentoj (se malpli ol 20) el la jaro 1965 estas kalkulataj aldone al la poentoj akiritaj en 1966?

Resp.: Ne, ni kalkulas nur ekde Januaro 1966, t.e. inkluzive la 657-an konkurson. Pri 1967 bv. vidi la regularon en la januara numero de tiu ĉi jaro.

Dem.: La aerpoŝta afranko estas tiel alta, ke ne plu valoras sendi la solvojn. Ĉu mi ne povas sendi ilin al Roterdamo?

Resp.: Ne sendu la solvojn al Roterdamo, ĉar inter Nederlando kaj Japanujo ne validas speciale favora tarifo! Sendu vian solvon per ordinara mara poŝto — egale en kiu lando vi loĝas. Mi atendos sufiĉe longe!



Vere, sinjorino, ŝuojn interne pli grandajn ol ekstere ni ne havas!

## ANONCETOJ

Tarifo: 2 vortoj je 1 Stelo,  
minimуме 12 Steloj.

**EVANGELIA LITERATURO** ricevbla ĉe Esperanto Misio, Sveda sekcio de KELI, Box 7, Östansjö, Svedujo.

**MARTINUS INSTITUTO** instigas al memstara kaj objektiva prijugo de la bazaj faktoj en la vivo. Ĝi ne celas al kredo, ĉar kredo ne estas utila en esplorado de faktoj. — Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

**LETERVESPERO:** Okaze de la fino de nia komencantokurso ni petas al ĉiuj Esperantistoj sendi leteron al: A. Bloemhard, Hoefbladlaan 58, Den Haag, Nederlando. Respondo garantiita.

**POSTMARKOJ:** Aŭstraliaj PMj interŝanĝi; ĉiuj landoj (escepte Eŭropo); uzitajn nur, sendu: S-ro E. E. Thompson, Flat 6, „Chorleywood“, 63 Balwyn Rd., Balwyn, Vic., Aŭstralio.

**ĈU VI ESTAS VIVANTAJ** kaj sanaj, miaj geamikoj el periodo 1926-36? Respondu: G. M. Dehterev, ul. Junih Pionerov 31-A, Omutninsk, Kirovskoj obl., Sovetunio.

## TIU ĈI NUMERO

estas la lasta kiun vi ricevas, se vi ankoraŭ ne pagis la abonon 1967.

Zorgu, ke neniu numero mankos al vi! Se vi ankoraŭ ne reabonis, tuj sendu la abonkotizon (minimume 40 stelojn) al U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando, poŝtkonto 378964, aŭ al unu el la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A.

Se La Praktiko plaĉas al vi

**VARBU ABONANTOJN!**

Ĉiu varbinto ricevos premion. Petu varbilojn ĉe la Centra Oficejo de U.E.A.!

# la mondo ridas

### En lernohoro de la matematiko

„Jam centfoje mi diris al vi, Kalnin, ke ne ekzistas iaj pli grandaj kaj pli malgrandaj duonoj. Du duonoj ĉiam estas egalaj... Sed mi vidas, ke la pli granda duono inter vi tion ne komprenas!”

### La sola helpanto

Malgranda Aŭsma kuŝas en sia liteto kaj petas Dion: „Aminda Dioĉjo, faru tiel, ke Parizo estu ĉefurbo de Anglujo!”

Patrino, aŭdinte tion: „Infaneto, kiel vi tiajn aferojn povas peti de Dioĉjo! Kial vi ĝin bezonas?”

„Jes, mi hodiaŭ havis skriban ekzamenon je geografio, kaj mi skribis, ke Parizo estas ĉefurbo de Anglujo”, respondas Aŭsma.

### Difino

„Paĉjo, kio vere estas ekonomiisto?”  
„Tio estas viro, kiu science pruvus, kial mankas la mono”.

★

„Paĉjo, kio estas konsekvenco?”  
„Konsekvenco, jen, estas tio, ke la homo hodiaŭ faras tiel kaj morgaŭ tiel, sed ne ke hodiaŭ li faras tiel kaj morgaŭ tiel”.

Trad. David Buŝs

### Komparo

Edzino: „Imagu, edzeĉjo, en la gazetoj oni skribas, ke de Eŭropo ĝis Usono estonte oni veturos nur tri horojn”.

Edzo: „Jes, ĝuste tiom longe, kiom vi bezonas por vin vesti”.

### La malkaŝema

„Respondu, Olga, al mi honeste, ĉu mi estas la unua viro, kiu petis de vi kison?”

„Jes. Ĉiuj ceteraj kisis min, ne postulante permeson”.

### Ne eblas

Kuracisto: „Via edzo bezonas pacon, absolutan pacon”.

Sinjorino: „Tio ne estas ebla, sinjoro kuracisto, mi ĝis nun ne havas printempan mantelon kaj ĉapelon”.

### Miskomprenulo

Edzino (tre malsana): „Promesu al mi, Jani, kaj ĵuru, ke post mia morto alian edzinon vi ne prenos!”

Edzo: „Sed se vi restos viva?”

### Bone dirita

„Vidu, Karleto, la pekoj de patroj trafas infanojn! Ĉu vi povas diri iun ekzemplon?”

„Jes, sinjoro instruisto, kiam la patro helpas al la infanoj en verkado”.

### Ne estas eliro

„Hieraŭ mi konfesis al mia fianĉino ĉiujn pekajn de pasinteco”.

„... kaj?”  
„Helpis nenio! Post tri semajnoj ni havos geedziĝon!”



He, kamarado, sub plorsaliko vi ne metu niajn balot-afiŝojn!

### Fortika ĉepalo

„Kion vi diras, vi jam dekunu jarojn portadas tiun ĉi ĉapelon?”

„Jes, ĝi estas el tre bona materialo. Unufoje mi ĝin tinkturigis, unufoje mi ĝin lavigis, unufoje mi surmetis novan rubandon kaj unufoje mi ĝin interŝanĝis en restoracio”.

### Malkompreniĝo

„Ĉu vi scias, Arnoldo, la hundo, kiun mi en pasinta semajno aĉetis de vi, min igas nerva.”

„Kial? Ĝi ja tre plaĉis al vi”.

„Jes, sed ĝi la tutan tempon malbele hurlas kaj bojas”.

„Ĉu vi volis je kvin rubloj aĉeti hundon, kiu kantas kiel Benjamino Gilji?”

### Kiu estas pli profunda

Erna jam du horojn en la librovendejo vane serĉadis vere seriozan libron. Ĉiuj al ŝi ŝajnis malprofundaj.

„Ĉu vi havas iun ajn pli profundan?” finfine ŝi demandis.

„Jes, mi havas!” senesperiginte respondis la vendisto, — „prenu „Tridek mejlojn sub la mara nivelo” de Jil Vern”.



„Sinjorino — multe pli ol kvindek... — „Kia impertinenteco! Mi ĵus fariĝis kvardek ses!”

# La malgranda Praktiko

## La ridanta neĝpupo

Meze sur la Tilioplaceto en la vilaĝo la infanoj faris grandegan neĝpupon. Ĝi estis ne nur granda neĝpupo, sed ĝi estis ankaŭ tre bela. Ili metis ĉapelon sur ĝian kapon, veran sinjoran ĉapelon, kaj eĉ ne tiel malnovan. Nigregajn karbo-okulojn ĝi ricevis. Ankaŭ nazon, kvankam oni povis bone vidi, ke ĝi estas nenio alia ol karoto. Kaj ili ŝovis balailon sur ĝian brakon. Eĉ la butonojn de ĝia jako ili ne forgesis. La neĝpupo povis esti kontenta. Kaj ĝi estis kontenta. Pli ol kontenta ĝi estis, kiel ĝi staris tie sur la Tilioplaceto kaj vidis la ridantajn infanojn ĉirkaŭen dancantajn. Sed kontraŭe de ĝi estis la granda montrofenestro de sinjoro Sekvinbero, la spicisto. Kaj subite la neĝpupo rimarkis, ke ĝi povas speguliĝi en ĝi. Ĝi vidis sin staranta inter la saltantaj infanoj kaj ĝi ektimis. Ne, ĉar ĝi aspektis ne sufiĉe bele. Pri tio nenio estis por riproĉa kritiko. Sed ĝi ektimis, ĉar ĝi havis tian severan vizaĝon. Ĝia buŝo estis maldika rekta linio. En ĝin la infanoj estis puŝintaj alumeton. „Kial mi ne ridas kiel la infanoj?” pensis la neĝpupo. Ĝi provis, sed ne sukcesis. Ĝiaj vangoj malmole frostiĝis. Ĝia buŝo estis senmova kaj rekta. La neĝpupo deziris ridi, sed ĝi ne povis. Ĝi fikse rigardadis antaŭ si en la montrofenestron de sinjoro Sekvinbero. „Kia severa neĝpupo mi estas. Kaj tiel inter ĉiuj tiuj ridantaj infanoj!” ĝi pensis. Malfruiĝis pli kaj pli. La infanoj de la Tilioplaceto iris hejmen. Mallumiĝis. Silentiĝis. Kaj fine noktiĝis. Neniu plu iris surstrate. Ĉiu estis hejme krom la neĝpupo, kiu bedaŭris, ke ĝi ne povas ridi. Kaj, krom iu alia: malgranda koboldo, vestita en pelta jako. Li staris sur sledo, kiu estis antaŭentirata de blanka muso. Rapidege li surveturis la Tilioplaceton. La koboldo blovis en siajn manojn. Li estis malvarma. Kaj li jam revis esti hejme, kie brulas bonega lignofajro, kaj li komforte povos varmigi sin.


„Ĉu vi ne povas kuri iom pli rapide, ĉevalo?” li kriis al la muso. (Vi eble scias, ke la koboldoj nomas la musojn „ĉevalo”).

„Mi estas tiel laca”, la muso pepis. „Kaj mi estas tiel malsata. Mi ankoraŭ nenion manĝis la tutan tagon.”

La koboldo kapneis. „Mi ne povas helpi ĝin. Ĉiuj rapoj troviĝas profunde en la malmole frostiĝinta tero. Mi ne povis atingi ilin.”

„Kaj mi ne plu povas tiri,” pepis la muso kaj la sledo ekhaltis.

„Ĉu vi vere ne plu povas, ĉevalo?” petis la koboldo.



„Eĉ ne unu paŝon,” la muso diris senhezite kaj antaŭenfalis sin en la neĝon. Tuj apud la neĝpupon. La koboldo rigardis alten. „Ĉi tie ni nun staras,” li diris al la neĝpupo. „Por vi ne estas tiel terure, ĉar via loko estas ĉi tie. Sed mi loĝas en la arbaro kaj mia ĉevalo ne plu volas kuri.”

„Tiel ni ĉiuj havas niajn zorgojn.” diris la neĝpupo. „Mi volus, sed mi ne povas.” „Mirigite la koboldo flanken klinis sian kapeton.” „Ĉu vi volas kuri?” li demandis. „Kuranta neĝpupo, pri tio mi neniam aŭdis!”

„Sed ne kuri, mi volas ridi,” klarigis la neĝpupo. „Ĉu vi eble povas instruiton al mi?” La koboldo penseme gratis sub sia pelta ĉapo. „Se mi povus sorĉi, tiam estus bagatelo,” li kapjesis. „Sed mi ne povas sorĉi. Imagu! Tiam mi ne haltus en la neĝo kun malsata ĉevalo. Tiam mi komence sorĉus bonan manĝaĵon. Kompatinda besto. Mi aŭdas ĝian ventron grumbli pro malsato.” „Jes”, ĝemis la neĝpupo, „ankaŭ mi ne havas manĝaĵon ĉe mi. Sed tie en la spicejo de sinjoro Sekvinbero estas sufiĉe. Tie vi eble povos forpreni ion.”

La koboldo sulkigis sian frunton. „Kion vi opinias?” li kriis. „Koboldoj neniam forprenas ion. Almenaŭ bonedukitaj koboldoj kiel mi.” La neĝpupo hontigite rigardis sian nazon. Ĝi komprenis, ke ĝi diris ion nedecan. Sed ĝuste, ĉar ĝi rigardis sian nazon, ĝi elpensis ion pli bonan. „Mia nazo!” ĝi ekkriis. „Rigardu, karoto. Ĉu via ĉevalo eble ŝatas tion?”

„Kompreneble”, pepis la muso, kiu samtempe suprensaltis. „Tion eĉ la ĉevalo de Sankta Nikolao ŝatas. Kie estas la karoto?”

Sed la koboldo diris: „Aŭskultu, tio estas bonege oferita, sed ja ne ebla: Ĉar kiu formanĝigus sian nazon!”

„Mi”, la neĝpupo diris kviete. „Mi ja ne povas ridi, sed tamen mi estas afa-

bla kiel vi vidas.” La muso jam piedfrapetadis pro malpacienco. Tuj post kiam la koboldo malligis la bridojn, ĝi suprenkuregis laŭ la korpo de la neĝpupo kaj post momento ĝi sidis, manĝoĝuanta la bongustan, oranĝkoloran karotnazon.

„Kara, bona neĝpupo,” ĝemis la koboldo. Kaj subite li ekpensis pri io.

„Nun mi ridigos vin,” li kriis. Per manoj kaj piedoj li komencis suprengrimpi sur la neĝpupo. Daŭris ĉe li iom pli longe ol ĉe la muso ĝis li fine estis supre. Tiam li fortiris per la montrofingro la alumeton el la vizaĝo de la neĝpupo. Per rapidaj manetoj li komencis forĝeteti la neĝon, tiel ke la neĝpupo ricevis rondan buŝeton. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉis. La koboldo gratetis kaj knedis tiel longe, ke fariĝis larĝe malfermita, ridanta buŝo. Nur tiam li haltis.

„Ĉu vi satmanĝis?” li demandis la muson. „Jes, mastro”, ĉi tiu pepis. „Mi denove povos elteni la vojaĝon. Ĉu ni iru plu?”

Ili adiaŭis la neĝpupon kaj foriris tuj al la arbaro. En la lunlumo la neĝpupo povis rigardi sin en la montrofenestro de sinjoro Sekvinbero.

Jes, ĝi ridis. Ĝi estis tute ne plu severa. „Tiel mi ĉiam volis aspekti” pensis kontente la neĝpupo. „Mia nazo multe malgrandiĝis; tio estas vera. Sed feliĉe la muso postlasis almenaŭ malgrandan pecon. Kun malgranda nazo neĝpupo ja ankaŭ povas pasigi la vintron.”

Tiel okazis, ke la infanoj de la Tilioplaceto trovis matene ridantan neĝpupon. Ili ja estis surprizitaj. Ĝu ĝi ridos ankoraŭ morgaŭ? — ili demandis sin reciproke. Kaj tion la neĝpupo faris: Ĝi ridis tiel longe kiel ĝi staris sur la Tilioplaceto.

el: „Verhalen van de sprookjesmolen” de Lea Smulders; trad. Tj. Postma.

Jus aperis

## IVO LAPENNA ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

**La Unua Parto** konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

**La Dua Parto** enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

**ĈIU** leginto de **RETORIKO**, ĈIU persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 16 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

152 pp., formato 20 × 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.  
Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA!

## NOVA DISKO!

Kantas:

## RAMONA VAN DALSEM

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

## LA FELIĈO

KAJ SES ALIAJ KANTOJ EN ESPERANTO

La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas verkitaj de la kantistino mem, kiu jam ricevis bonegan reputacion pro siaj ĉarmegaj, belsonaj kantoj. La disko pruvas la perfektan taŭgecon de Esperanto por prikanti ĉiajn temojn kaj sentojn.

Senriproĉa prononco.

Klarega lingvo.

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo.

Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj.

Aldonu 10% por sendkostoj.

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964.

„Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la kampo de la viva dramo.”

A. D. Foote en British Esperantist

„La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el la majesta poezio de la originalo.”

D. B. Gregor en Heroldo

„Neniu franca traduko povas atingi la altan gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kaloesay-a traduko.”

Robert Martin en Franca Esperantisto

„Kaloesay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon. Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia atuto.”

William Auld en la revuo Esperanto

## REĜO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld.

Broŝurita: 14,— gld.

Eldonita de UEA

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964.

La revuo

## „ESPERANTO”

estas la oficiala organo de UEA kaj estas la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo, kun legantoj en 83 landoj.

## „ESPERANTO”

estas via revuo kaj dependas de via apogo.

Abonu ĝin! Varbu por ĝi

abonantojn (18,75 gld. jare)  
kaj Membrojn-Abonantojn, do kun la jarlibro de UEA  
(25,— gld. jare)

Petu abonilon de la Centra Oficejo de UEA,  
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



Petu specimenan ekzempleron!